

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Rendevuo
baldaŭ en
Berlino**



**Estrara Raporto
1998**



**Inter dekmil
pacaktivuloj
en Hago**



Kiu zorgas pri etaj lingvoj?

Vi trovos...

101 *Malferme*

En la lernejojn... kial?

Maŭro La Torre

102 **MALPLI UZATAJ, MALPLI UZINDAJ?**

*Laŭ Jordi Bañeres
kaj Miquel Strubell*

*La lingva diverseco de Eŭropo
estas rikaĵo protektenda.*



Olien, el Discussion Manual on lesser-used languages

104 *Eksteraj rilatoj*

Ni aŭdis la pac-alkvokon

Osmo Buller

105 REAGOJ

106 KONGRESA KOMUNIKO 3



107 *Estrara Raporto*

UEA EN 1998

ĜENERALAĴOJ

Membraro elektis aktive

108 ADMINISTRADO

Vigla servo-jaro

FINANCO

Kun atento al estonteco

109 KONGRESO

Superlativa sukceso



110 LANDA KAJ REGIONA AGADO

Eŭropo lamas, cetero flamas

KAMPANJO 2000

Vasta akcepto



111 INFORMADO

Unuaj paŝoj en la reton

EKSTERAJ RILATOJ

Homrajta jubileo en fokuso

112 KULTURO

Kvalita rikolto

FAKA AGADO, SCIENCO

Atento al terminologio

EDUKADO

Al kulturo de paco

113 JUNULARO

Nuboj super 60-jariĝo

114 LINGVO, ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Eldone kaj prelege

FINANCAJ ALDONAĴOJ

Spezokonto

Bilanco



Kaj plue...

116 LOKE, FOLIUME

117 FAKE, INFLUE

118 RECENZOJ

SIBAYAMA Zyun'iti pri

Ordeno de verkistoj

Sabira Ståhlberg pri

La ŝtona urbo

119 LASTE APERIS

120 FORPASOJ

La kovrilo: Samea knabo fieras pri sia boaco. (Finna Turisma Buroo)

Dekstra paĝo: Lago Mývatn en Islando. (Islanda Turisma Buroo)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.


Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



EN LA LERNEJOJN... KIAL?

“Enkonduki la instruadon de Esperanto en la lernejojn!” Tio estas ofte deklamata devizo, kiu esprimas ja revon, pli ol celon proksiman, konkrete atingotan.

Antaŭ unu jaro sur ĉi tiuj paĝoj (jun. '98, p. 118), ni pridiskutis la bezonon elpensi projekton por kontribui (per Esperanto) al interkultura edukado en la lernejoj. Poste en Montpeliero la ideo estis publike lanĉita sub formo de Interreta Kvazaŭa Lernejo. Dum la vintro varbiĝis por tia lernejo pli ol 30 klasoj, kiuj ekde septembro grupiĝos laŭ temoj kaj agniveloj, por komune esplori pri siaj vivmanieroj, vivmedioj kaj kulturoj.

Ekzemple, komparinte la manĝojn de iu semajno, areto da elementaj klasoj (diverslokaj en la mondo) malkovros la lokecon de manĝo-kutimoj, ties rilatojn kun la disponataj rimedoj, klimato, eĉ moroj kaj tradicioj. Samtempe rondo de liceaj klasoj, de Patagonio ĝis Laponujo, kolektos specimenojn de tradicia parola literaturo, por analizi ilian enhavon kaj strukturon.

Fine de ĉiu laborperiodo (t.e. jarduono, pro la malkongruo inter nordaj kaj sudaj instrusezonoj) la esplorintaj lernejoj kunmetos ekspozicion el siaj rezultoj, viziteblan por gepatroj, geavoj kaj geamikoj el la tuta mondo, kompreneble... tra la komputila reto.

Tia dujara kunlaborado — samtempe komuna kaj disa — okazos nome de kaj memore al la konata vojaĝa esploristo Tibor Sekelj (1912-1988). La Interreta

Kvazaŭa Lernejo prenis lian nomon ne nur por memorigi pri li kiel esperantista geografiisto, etnologo kaj verkisto, sed precipe por reproponi lian ekzemplon de profesia — praktika — uzado de la Internacia Lingvo.

Ne temas ĉi tie pri la (troigita) rivalado inter finvenkistoj kaj raŭmistoj. Temas pri propono en la instruistaj medioj de eduka laboro — en si mem valora kaj konstruopova —, por kiu Esperanto estas ilo signifa kaj efika.

La interreta *kvazaŭlernejo* ne trudas fiksjajn studprogramojn, egalajn por ĉiuj: ĝi estas ŝelo, en kiu la infanoj trovu sugestojn por esploro kaj rimedojn por plenumado. Principe ĝi alvokas ĉiajn kunlaboremulojn:

— unue, kompreneble, instruistojn kiuj volas partopreni (ankaŭ se nur parte) kun siaj klasoj aŭ lernantogrupoj;

— due, kontribuemulojn per sugestoj aŭ materialoj pri sia kulturo kaj etno;

— trie, tajpemulojn, por enretigo de ricevataj interesaj paperaj materialoj;

— kvare, mon-helpantojn, por faciligi la aliron al Interreto (aŭ ricevon de paperaj materialoj) al la klasoj en malpli riĉaj mondopartoj.

Fina dubo: ĉu la “interkultura edukado” de la jaroj 2000-aj, funde, povus esti nuntempa koncepta adapto de io pli bone konata sub la nomo “interna ideo”?

Maŭro La Torre



Malpli uzataj, malpli uzataj

Adaptitaj demandoj kaj respondoj el Discussion Manual on lesser-used languages

("Diskut-gvidilo pri malpli uzataj lingvoj"), 1998, de Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell

Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj eldonis gvidlibreton pri temo kiu tuŝas, evidente, ne nur Eŭropon.

Oni kelkfoje diras ke la minoritataj lingvoj estas malgravaj en la nuntempa Eŭropo. La lingva diverseco de Eŭropo estas riĉaĵo protektenda: aliaj kontinentoj posedas ja pli grandan lingvan variecon, sed Eŭropo havas la bonŝancon ke ĝi atingis evolu-nivelon je kiu ni povas profiti el ĝia lingva diverseco.

Ĉu havas sencon provi protekti minoritatajn lingvojn? Antaŭ pli ol 30 jaroj deklaro de Unesko substrekiis ke "ĉiu kulturo havas dignon kaj valoron respektendan kaj konservendan"¹. Plie, "en ĉiuj lingvoj esprimiĝas kolektiva identeco kaj aparta maniero percepti kaj priskribi la realon, kaj tial ili devas ĝui la kondiĉojn bezonatajn por evolui en ĉiuj siaj funkcioj"².

Kial instigi lingvan diversecon, dum la mondo fariĝas tutgloba vilaĝo? Ĉu ne sufiĉas la jamaj problemoj kaj dividoj?

Kultura identeco iĝas nun atuto kiu kapabligas homojn superi la gradan malfortiĝon de longdaŭraj tradicioj, rezultantan el la tutmondiĝo. Kaj plie, laŭ trafa vortumo de Eileen Lemass, deputito en Eŭropa Parlamento: "Lingva kaj kultura diverseco neniam estigas konfliktojn. Problemojn kaj malpacon kaŭzas tio ke iuj rifuzas adaptiĝi al diverseco, akcepti ĝin."

Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj

Ne-profitcela establo fondita en 1983, EBMUL funkcias kiel forumo por la organizaĵoj kiuj antaŭenigas ĉi tiujn lingvojn en Eŭropo. Ni intervjuis la tiaman prezidanton de EBMUL, Allan Wynne Jones, en 1996 (sep. '96, p. 147).

Adreso de la Informa Centro de EBMUL: Europees Bureau voor Taalminderheden, Sint-Jooststraat 49, BE-1210 Brussel, Belgio; ☎+32/2/218-25-90; 📠218-19-74; ✉pub00341@innet.be, <http://www.eblul.org/>



Kian kontribuan povas doni minoritataj lingvoj kaj iliaj parolantoj?

Ĉar preskaŭ ĉiuj parolantoj de malpli uzataj lingvoj — kaj de la demografie malpli grandaj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio — estas mem du- aŭ multlingvaj, ili fakte avangardas en la tutmonda tendenco al kreskanta plurlingva kompetento, kiun homoj nuntempe bezonas.

zindaj?



Tamen, la rajtoj kiujn postulas parolantoj de minoritataj lingvoj, ne multe rilatas al la universalaj homaj rajtoj. . .

Lingvaj rajtoj estas unu faceto de la homaj rajtoj, kaj malrespekti ilin povas serioze damaĝi la homan dignon. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj klare asertas ke ĉiu devas ĝui la samajn rajtojn kaj liberecojn, sen diferencigo laŭ lingvo³.

Iuj fakuloj pri juro provas distingi inter individuaj rajtoj, kiuj fontas el la Universala Deklaracio, kaj kolektivaj rajtoj, koncepto kiun ili malaprobas.

Juraj sistemoj malsamas, kaj en iuj kazoj nur individuaj rajtoj estas oficiale agnoskataj, ne grupaj. Tamen multaj internaciaj dokumentoj prilumas ĉi tiun miskomprenon. Laŭ unu el ili, "homoj kiuj apartenas al naciaj minoritatoj povas praktiki kaj ĝui siajn rajtojn same individue kiel komune kun siaj samgrupanoj"⁴.

Kio estas la Eŭropa Ĉarto de Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj?

Olsen, el Discussion Manual on lesser-used languages

La Ĉarto estis malfermita al la subskriboj de la membroŝtatoj de Konsilio de Eŭropo, en Strasburgo, la 5-an de novembro 1992. Ĝi ekvalidis la 1-an de marto 1998, post 5 ratifikaĵoj. La traktato celas protektadon kaj progresigon de la historiaj lingvoj regionaj aŭ minoritataj de Eŭropo. La Ĉarto difinas aron da disonoj por antaŭenigi ĉi ties publikan uzadon. Ili rilatas al la kampoj

edukado, justico, administrado kaj publikaj servoj, amas-informiloj, kulturaj agadoj kaj instalaĵoj, ekonomiaj kaj sociaj aktivaĵoj kaj translimaj interŝanĝoj. Ĉiu aliĝanto al la Ĉarto devigas sin apliki almenaŭ 35 paragrafojn aŭ subparagrafojn elektitajn el tiuj disonoj, inkluzive de iuj kernaj disonoj devige elektendaj. Ĝis la 1-a de apr. 1998 jenaj ŝtatoj subskribis kaj ratifikis la Ĉarton: Finnlando, Hungario, Kroatio, Liĥtenŝtejno, Nederlando, Norvegio, Svislando. Subskribis ĝin Aŭstrio, Cipro, Danlando, Germanio, Hispanio, Luksemburgio, Makedonio, Malto, Rumanio, Slovenio, Ukrainio.

Kio estas la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj?

Temas pri iniciato de Internacia Centro Escarré por Etnaj Minoritatoj kaj Nacioj kaj de Internacia PEN por difini la lingvajn rajtojn de popoloj. La Deklaro estis aklande akceptita la 6-an de junio 1996 en Barcelona mondkonferenco, kiun partoprenis 61 NRO-j, 41 PEN-centroj kaj 40 fakuloj pri lingva juro. [Vd. dec. '98, p. 206.] La Deklaracion oni nun revizias, en la espero ke Unesko ĝin adoptos.

Leviĝas la demando: kian sencon havas peni por evoluigi lingvojn kiuj ne taŭgas por uzo en la moderna mondo?

En la duobla kunteksto de tutmondiĝo kaj de kreskanta regionariĝo de Eŭropo, kultura identeco — kies spino estas lingvo — fariĝas helpilo de merkato-esploristoj por distingi eblajn klientojn kaj produktojn, kaj por efike komunikadi.

Oni foje aŭdas ke, pro la jama malfacileco trakti dek unu oficialajn EU-lingvojn, estus sence kreskigi la nombron.

Aparte de la urĝa neceso replani la lingvan reĝimon de la Unio, klare misfunkcia, kaj anstataŭigi ĝin eble per sistemo simila al tiu de UN, nepre necesas ke la Unio repriprenu sian ekskludon de aliaj lingvoj aŭtoktonaj en membroŝtatoj.

Gravas ke estu trovata maniero por respekti la rajtojn de la parolantoj de ĉiuj ĉi lingvoj, almenaŭ je loka nivelo. Notindas tamen ke oni devas klare distingi inter la lingvoj de interna komunikado kaj la lingvoj pere de kiuj oni servas al la eŭropaj popoloj. Studo farita de la Universitato de Duisburg sugestas ke ĉ. 96% de la interna EU-komunikado okazas ĉu en la franca ĉu en la angla.

Oni foje asertas ke instigi la lingvan diversecon povus esti, fakte, plia stumbligilo sur la vojo al unuiginta Eŭropo.

Respekti la lingvan diversecon apartenas al la eŭropa trejniĝo: la Eŭropo de civitanoj estas antaŭ ĉio loko de renkontoj kaj de kunlaboro inter popoloj kun malsamaj lingvoj, kulturo kaj historio. Logike ne eblas aserti ke Eŭropo estas konstruebla surbaze de respekto por la najbaroj kaj partneroj, se interne de la membroŝtatoj mankas respekto por lingva kaj kultura diverseco.

Se ni rigardas la procezon el tut-eŭropa vidpunkto, la elkresko de supernacia strukturo — eksiganta la koncepton de ŝtato kiel baza unuo —, la malapero de internaj limoj kaj la kreskanta integriĝo ekonomia kaj politika signifas ke ĉiu lingvo, ĉiu kulturo, ĉiu nacio fariĝas malplimulto. Neniu volas esti regata aŭ perdi sian identecon — kaj tiurilate la sperto kiun minoritataj lingvogrupoj estos kolektintaj je la loka nivelo, fariĝos kerna elemento por lerni kiel mastrumi la lingvan mozaikon de Eŭropo.

Trad. István Ertl

NOTOJ

1. Deklaro pri la Principoj de Internacia Kultura Kunlaboro, Unesko, 1966.
2. Art. 7.1. Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj, Barcelono, junio 1996.
3. Art. 2. Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Unuigintaj Nacioj, 1948.
4. §32.6. Dokumento de la Kopenhaga Renkontiĝo de la Konferenco pri la Homa Dimensio, Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, 1990.

Precize cent jarojn pli frue okazis samurbe, laŭ iniciato de la rusa caro, la unua internacia packonferenco. Ĉi-foje temis tamen pri iniciato de la civila socio, ne pri kunveno de registaraj reprezentantoj.

sin eksteruloj en la konferenco, kies prelegoj kaj diskutoj okazis praktike nur en la angla, kiun ili malbone aŭ tute ne scipovis. Per tiu fakto niaj deĵorantoj ne forgesis rebati al tiuj — cetera tre malmultaj — vizitantoj laŭ


ĉiam estu malfermita ĉe la ĝusta paĝo!) La nederlanda Unesko-centro disdonis la plej freŝan numeron de sia revuo, en kiu J. H. Derks prezentis la Nitobelibron *Al lingva demokratio*. La eldonisto de la renoma brita *Peace News* disdonis numeron kun artikolo de Paul Hewitt pri Esperanto.

Gustumon de nia lingvo donis provlecion Atilio Orellana Rojas. Komence de tiu UEA-programero Sylvain Lelarge prezentis la projekton “Indiĝenaj diaĵoj” (vd. p. 117, sube).

Krom multaj malgrandaj aranĝoj tra la mondo, la Haga Alvoko planas iam okazigi duan grandan konferencon. Ĝi okazos eble ekster Eŭropo, ĉar la organizantoj ne kaŝis sian ĉagreniĝon pro la rifuzo de vizo al multaj partoprenemuloj el la Tria Mondo. ★

Ni aŭdis la pac-alvokon

Osmo Buller



Preskaŭ 10 000 pacaktivuloj el pli ol 100 landoj ariĝis por la konferenco de la Haga Alvoko por Paco en la Kongrescentro de Hago (11-15 majo).

Haga Alvoko por Paco (<http://www.hap99.org>) estas movado kiu reprezentas jam pli ol 700 neregistaraĵojn, i.a. UEA. La maja konferenco akceptis 50-eran dokumenton, “Haga Agendo por Paco kaj Justeco en la 21-a Jarcento”, kiu postulas plenumon de dek principoj (vd. apude) por fundamenti justan mondan ordon.

UEA engaĝos sin en la realigo de la Agendo kaj en ĝia plua disvolvado. Precipe la pac-edukado estas propra al UEA kiel unu el ĝiaj statutaj celoj kaj tradiciaj agadoj.

UEA donis multlingvan rifuĝejon

Dum la konferenco funkciis stando de UEA, kiu daŭre ricevis vizitantojn kaj disdonis multe da materialo. Plej furoris la anglalingva flugfolio *An Update on Esperanto* kaj la multlingve havebla Manifesto de Prago. La multlingveco de la UEA-sortimento tre impresis la vizitantojn. Multaj el ili plendis senti

kiuj la lingvan problemon jam solvis la angla. Krom preni senpagajn materialojn, multaj eĉ aĉetis E-lernilojn.

Surprizis la nombro de E-parolantaj konferencanoj: almenaŭ 25. Ĉeestis konataj pac-agantoj kiel Anatoli Ionesov (Uzbekio), Daniel Durand (Francio), John Roberts (Britio) kaj Juliusz Wasik (Pollando), sed la aliaj plejparte antaŭ longe perdis kontakton kun nia movado aŭ eĉ kredis ke ĝi malaperis. Malkovri la UEA-budon do agrable surprizis ilin. Pluraj promesis reaktivigi kaj refreŝigi sian rustintan lingvoscion. Irana samideanino tuj aliĝis al UEA — kaj aĉetis PIV memore al la konferenco. La ŝanco eltrovi iamajn kaj neniamajn E-movadanojn montriĝas do plia kialo por ĉeesti en tiaj aranĝoj.

Esperanton oni povis trafi ankaŭ ĉe tri aliaj budoj. Tiu de SERVAS ekspoziciis numeron de sia revuo kun artikolo de François Randin pri Esperanto. (La UEA-standanoj zorgis ke ĝi

La stando de UEA

La “Dek principoj” inspiris japanan dancon.

Dek bazaj principoj por justa mond-ordo

1. Ĉiu parlamento adoptu rezolucion kiu malpermesas al ĝia registaro ekmiliti — kiel la artikolo 9 de la japana konstitucio.
2. Ĉiu ŝtato rekonu — senkondiĉe — la juĝrajton de la Internacia Kortumo ĉe ĝi.
3. Ĉiu registaro subskribu la Traktaton pri starigo de Internacia Krimkortumo kaj plenumu la Traktaton pri Minoj.
4. Ĉiu ŝtato igu propra la Novan Diplomatikon, t.e. partnerecon inter la registaroj, la internaciaj organizaĵoj kaj la civila socio.
5. La mondo ne povas senfare rigardi helpnecesigajn krizojn; forto estu ekuzata nur kiam ĉiuj diplomaciaj rimedoj estas eluzitaj, kaj eĉ tiam nur sub la aŭtoritato de UN.
6. Tuj komenciĝu intertraktoj pri Konvencio por la Forigo de Nukleaj Armitoj.
7. La komerco de malgrandaj armiloj estu strikte limigita.
8. La ekonomiaj rajtoj estu traktataj same serioze kiel la civitanaj rajtoj.
9. Pac-edukado estu deviga en ĉiuj lernejoj de la mondo.
10. La plano pri Tutmonda Agado por Preventi Militon fariĝu la bazo por paca mond-ordo.

(Laŭ la Haga Agendo por Paco kaj Justeco)

Reagoj



Insulto al pioniroj

En la aprila numero (p. 64-65) mi stumblis sur dupaĝa "intervjuo" kun Diego Marani, aŭtoro de la galimatia ĵargono "Europanto". Estas apenaŭ kredeble ke la redakcio senĝene kaj senrimorse malŝparas du tutajn paĝojn por paradigi tian idiotiaĵon. Tio estas vera insulto al la memoro de Schleyer, Zamenhof, Beaufront, Couturat, Ostwald, Jespersen kaj aliaj eminentaj pioniroj de la movado por interlingvo konstruita, facila, reproduktebla, fleksebla, kreiga, literatur-naska kaj humanisma.

Europanto situas antipode de Volapuko, Esperanto, Ido kaj Interlingua. Ĝi estas kaosa, miŝmaŝa, gelatena, galimatia, kakofonia kaj pajaca. Marani estas diletanto kaj paradulo. Li volas nur amuziĝi kaj moki la ideon mem de lingvoj tutmondaj. Kaj vi lasis vin moki kaj dupi!

Gonçalo Neves - Portugalio

Premiotaj priridotoj

De kiam mi informas pri Esperanto, mi almenaŭ malkovris ion: la plorindajn senkultur-econ kaj mensfermecon de multaj ĵurnalistoj. Pinton de l' absurdo atingas la raportado pri Diego Marani kaj lia Europanto: jen inteligenta homo, kiu deklaras plej sincere kaj insiste ke li nur amuziĝas per sia projekto, kaj malgraŭ tiuj atentigoj la ĵurnalistaro de la tuta Eŭropo persistas serioze pritrakti lian lingvaĵon, kiun oni pli-malpli komprenas nur se oni antaŭe lernis plurajn fremdajn lingvojn! Sed Europanto novas!



Edmond Ludwig - Francio

Atentokapta ŝerco

La Europanto-artikolo estis multflanka kaj bone prezentita. Ni esperantistoj bezonas sciojn pri fenomenoj kiuj rilatas al la plibonigo de la monda lingva situacio. Tamen nomi tiun ĉi fenomenon "lingvo" sur la kovrilpaĝo estas iom tro...

por mendi ĝian tre bonan lernolibron *Beginner's Esperanto*. La ŝoko venis kiam la telefona re-aganto respondis — iom skeptike — ke esperantistoj estas ia stranga sekto! Fakte, inter la post-lasaĵoj de sinmortigintaj ĉiel-pordaj sektanoj estis ankaŭ E-libroj, aŭ almenaŭ ekzemplero de *Beginner's Esperanto*, pro kio oni kontaktis la eldonejojn. Mi nun demandas min: per kia kanalo, rektameta aŭ spiritisma, Camacho povis ekscii ke...?

Ionel Oneŝ - Usono

Europanto kreskis el ŝerco kaj daŭre estas ŝerco. Temas pri luda mikrado de lingvoj, same kiel Transpiranto, luda poemlingvo de la sveda satira gazeto *Grönköpings Veckoblad*. [Vd. '94 apr., p. 79.]

Tamen, per humuro Europanto ankaŭ vekas atenton pri la lingva malegaleco en Eŭropo kaj en la mondo, kaj sekve ĝi kreas pli bonajn kondiĉojn ankaŭ por Esperanto.

Anna Ritamäki - Finnlando

Europanto instigu memkritike

La grandega intereso de la eŭropaj gazetaro kaj popolo pri Europanto provas ke oni preferas modajn ludojn al aferoj kiuj serioze povas kontribui al la monda paco, kiel Esperanto.

Aliflanke, anstataŭ envii Europanton, ni esperantistoj devas fari profundan memkritikon pri niaj agadmetodoj. Ekzemple, se la membraro de UEA kreskas ekster Eŭropo — dum en Eŭropo okazas la malo —, kial ne malfermi oficejojn tie kie Esperanto ŝajne havas pli bonajn kondiĉojn por florado: en Brazilo, Usono, Ĉinio, Togolando, Irano? Mono por tiom vasta agado certe venos per iniciatoj enspezodonaj, kiel internaciaj kursoj/seminarioj kaj rektaj varbkampanjoj. Krom tio certege la esperantistoj de la cititaj landoj (aŭ aliaj, kompreneble) ĝisfunde strebos por la bona funkciado de tiuj malcentraj UEA-oficejoj. Resume, havi centran oficejon en Eŭropo, ligitan per moderna teknologio kun pluraj oficejoj en ŝlosilaj partoj de la mondo, certe kontribuos al la dismala eŭropigo de Esperanto.

Fabrizio Rodrigues Valle - Brazilo

El la postkesto

Camacho kaj la kometanoj

Relegante la sulfuran *La liturgio de l' foiro* de Jorge Camacho, sur paĝo 5 mi trovis frazon kiu ŝokis (kaj amuzis) min: "Mi same ne mirus, se la anoj de la sekto Ĉiela Pordo, mortigintaj sin pasintjare en Usono por aliĝi al la kometo Hale Bopp, estintus esperantistoj." Nu, antaŭ kelkaj semajnoj ni ĉe la Centra Oficejo de ELNA telefonis al la eldonejo Hippocrene Books



84-a Universala Kongreso de Esperanto

Berlino, 31 julio – 7 aŭgusto 1999

Aliĝoj

Fine de majo estis aliĝintaj ĉ. 2400 kongresanoj el 60 landoj. Plej multaj venas, laŭvice, el Germanio, Francio, Japanio, Pollando kaj Nederlando. Montriĝas signifa malkresko de kongresanoj el orient-eŭropaj landoj, pro financaj problemoj kaj ekonomia krizo tie. Entute atendeblas ĉ. 2600 kongresanoj. La CO jam ne povas akcepti novajn aliĝojn; eblos aliĝi nur surloke, en la kongresejo mem.

Belega glumarko

kun la simbolo de nia sekva kongreso, la impona Brandenburga Pordego, aperis jam

en la Montpeliera UK kaj furore vendiĝis. Ideala ornamento por viaj

leteroj en la monatoj ĉirkaŭ la UK. Mendebles ĉe la Libroservo de UEA: 2,70 eŭroj por folio de 24. Triona rabato ekde 3 folioj.



Vizoj kaj invitleteroj

La germanaj konsulejoj, kiel atendite, tre strikte procedas pri vizodonado. LKK kaj UEA klopodas helpi kaj faciligi la ricevon, sed ne ĉiam sukcesas. Ĉi-faze bv. ne plu peti nian intervenon, ĉar la sperto montris ke klopodoj en la lastaj semajnoj restas senfruktaj.

Programo

Elstara scienca programo inkluzivos la 2-an Nitobe-simpozion (partoprenos ekstermovadaj fakuloj), du esperantologiajn sesiojn ("Lingvoj en la reto", "Esperanto kaj komputiloj"), terminologian kunvenon kaj du publikajn kunsidojn de la Akademio. Internacian Kongresan Universitaton rektoros la Nobel-premiito Reinhard Selten.

En riĉa arta programo, modernan kaj klasikan teatraĵojn prezentos du junaj trupoj kroata kaj franca. La muzika programo inkluzivos omaĝon al Chopin kaj viglan klasikan koncerton de famaj artistoj. Sur vestibla scenejo ĉiutage aŭdeblos muziko.

Infana Kongreseto

Ĝis nun aliĝis ĉ. 40 infanoj el 13 landoj. Ankoraŭ eblas aliĝi ĉe la organizanto: Sabine Trenner, Ebertystr. 46, DE-10249 Berlin, Germanio;

☎ +49/30/426-86-05; ✉ trine@berlin.snafu.de. (Vd. Dua Bulteno, p. 27.)

Junularo

Interesitoj petu programon kaj detalojn, ankaŭ pri la junulara amasloĝejo, de David-Emil Wickström (✉ junulara.programo@esperanto.de) aŭ ĉe la CO. Ni jam malkaŝu ke la furora bando Persone donos koncerton.

Ekskursoj

Kelkaj el ili devis esti nuligitaj pro nesufiĉaj aliĝoj. Mendintoj de ĉi tiuj ricevos avizon pri la nuligo, kun alternativaj proponoj. Bedaŭrinde ankaŭ la postkongresan ekskurson al la Balta Maro oni devis malmendi.

Mendoj

La Centra Oficejo ne plu akceptas mendojn por loĝado kaj ekskursoj. Eblos fari mendojn nur en la kongresejo, kvankam eble ne ĉiam laŭ la unua prefero, ĉar pluraj ekskursoj estos eventuale jam plenaj.

Pagoj

Kongresanoj kiuj ankoraŭ ŝuldas pro mendoj, prefere pagu antaŭ la UK, por eviti longan vicostaradon dum la ĝenerale premege unua kongrestago.

Kiu diris ke la brita movado konsistas nur el veteranoj? Gejunuloj en la 80-a Brita E-Kongreso (aprilo 1998, Chester)



Kevin Jones

UEA en 1998



ĜENERALAĴOJ

Membraro elektis aktive

Strukturo kaj konsisto

Slovakia Esperanta Federacio fariĝis la 60-a aliĝinta landa asocio de UEA. Post akcepto de kunlabora kontrakto kun Internacia Komunista E-ista Kolektivo (IKEK) kaj E-ista Internacia Centro de la Civitanoj de la Mondo, UEA havis oficialan ligan kun 9 aliĝintaj kaj 39 kunlaborantaj fakaj asocioj.

La individuaj membroj (IM) nombris 7360 en 120 landoj, t.e. 238 pli ol en 1997. Ili konsistis el 435 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1859 M kun Jarlibro, 452 junaj M kun Jarlibro, 3405 M-Abonantoj, 260 junaj M-Abonantoj, 859 Dumvivaj Membroj (DM), 17 junaj DM, 61 Honoraj M kaj 12 M de Honora Patrona Komitato. (Laŭlanda statistiko aperis en apr. '99, p. 66.) Kvankam la enspezoj de la jaraj kategorioj restis je 11 523 gld. sub la buĝeto, ili tamen kreskis je 11 242 gld. kompare kun 1997. La averaĝa

neta kotizo estis 48,96 gld. (49,02 en 1997).

La aligitaj membroj (AM) nombris 12 812 (13 035 en 1997); el ili 1959 estis junaj (1997: 2512). Sume UEA havis 20 172 membrojn en 1998 (20 157 en 1997). Al la mecenata kategorio Societo Zamenhof aliĝis 224 personoj (242 en 1997). Ses aktivuloj estis distingitaj per honora membreco: André Albault (Francio), Pierre Babin (Francio), Ignat Bociort (Rumanio), William Harmon (Usono), Claude Piron (Svisio) kaj YAMAZOE Saburô (Japanio). Forpasis la Honoraj Membroj Stojan Ĝuĝev, Julius Manson kaj Karl Söderberg.

La Jarlibro 1998 listigis 1981 delegitojn en 94 landoj (en 1997: 1950 en 90 landoj). Inter ili estis 43 ĉefdelegitoj, 4 regionaj delegitoj, 1055 lokaj delegitoj, 138 vicdelegitoj, 76 junularaj kaj 1452 fakaj delegitoj.

Gvidorganoj

La konsisto de la Komitato kiu funkciis ĝis la Montpeliera UK, aperis en la Jarlibro 1998 (p. 19-23); tiu de la Komitato por la periodo 1998-2001 en la Jarlibro 1999 (p. 17-21) kun 55 A-, 8 B- kaj 12 C-komitatanoj, kaj 11 observantoj. Menciindas la rekorda partopreno de individuaj membroj en la elektado de komitatanoj B: voĉdonis 2328 membroj, t.e. 33,64% (sep., p. 148). En la kunsidoj en Montpeliero partoprenis 58 komitatanoj (aŭ anstataŭantoj) kaj 4 observantoj (sep., p. 148-149).

La malnova Estraro konsistis el 7 membroj (Jarlibro 1998, p. 23). Ĝi kunsidis kompleta dum du tagoj fine de aprilo en la CO (jun., p. 106) kaj mallonge en la UK, kie ĝin sekvis nova Estraro 6-membra (vd. la kolofonon). Kvar membroj de tiu ĉi kunsidis en la UK, sed plenkunsido en la CO restis okazonta en 1999. Kaj la antaŭa kaj la nova Estraroj vigle interrilatis retroŝte, tiel ke pluraj decidoj estis fareblaj sen kunsido. La interna informilo *Estrara letero* estis dissendita 3 fojojn dum la antaŭa kaj 1 fojon dum la nova Estraro. ♦



ADMINISTRADO

Vigla servo-jaro

Estrarano: de Geus, poste Lipari

Personaro

La stabo de la Centra Oficejo ne ŝanĝiĝis. Laboris entute 11 oficistoj, el kiuj 2 partatempe, tiel ke la tuta laborforto egalas al 10 deĵorantoj plentempaj. Tri volontuloj helpis en la Kongresa Fako kaj la Libro servo, dum periodoj de unu ĝis tri monatoj. Tra la tuta jaro kvar lokaj volontuloj kunlaboris


partatempe en la Librotena Fako, Biblioteko Hodler kaj domprizorgado. Dum 11 monatoj deĵoris volontulo de TEJO, kaj jarkomence afrika volontulo spertiĝis pri la administrado de la afrika agado. En diversaj periodoj do entute 9 volontuloj laboris en la CO. La konstato ke portempa helpo ne sufiĉas por alfronti la ĉiam pli kreskantan laborpremon, igis la Estraron — laŭ Montpeliera propono de la Komitato — decidi pri dungo de plia oficisto en 1999, por transpreni parton de la librotenaj kaj kongresaj taskoj.

Ekipaĵoj, domo

Nova komputilo estis aĉetita por la Grafika Fako, por anstataŭigi kadukiĝintan. Donacoj al Fondaĵo Ilaro helpis akiri aparaton por skribi kompaktdiskojn, kiu ebligas malpli kostan arkivadon kaj transporton de datenoj por la Grafika Fako.

Oni anstataŭigis difektiĝintan tegmentan defluilon, kiu kaŭzis inundon en kelkaj ĉambroj — i.e. la biblioteko — okaze de subita pluvego. Sojle al la festado de la 90-jariĝo de UEA la sekretario kaj la kafĉambro ricevis novajn tapiŝojn kaj murpaperojn, dank'

La publiko svarmas en la libro servo de la Montpeliera UK.



UEA/F. Veuthey

al donaco de Frisa E-ista Rondo. La konferencejo estis provizita per portretoj de la ĝisnunaj prezidantoj de UEA. La ĉambro de la ĝenerala direktoro ricevis portreton de prof. d-ro Ivo Lapenna, donace de s-ino Birthe Lapenna.

Servoj

La Jarlibro aperis fine de junio. Ĝi enhavis 304 paĝojn, t.e. 8 pli ol en 1997. La pliampleksiĝon kaŭzis parte plimultiĝo de delegitoj, sed ĉefe la kreskanta kvanto de donitaĵoj pri ili (retadresoj, hejmpaĝoj, numeroj de faktiloj kaj de portebaj telefonoj). La revuo *Esperanto* aperis averaĝe en la unua semajno de la koncerna monato. La nombro de ĝiaj pagintaj ricevantoj (4933) ĉi-foje restis sub 5000, malkiel en 1997 (kaj 1995). Post la rekordaj 2050 abonoj en 1997, pli seriozan falon spertis *Kontakto*, al 1723.

Tre bonan jaron havis la Libro servo, kun malnetaj enspezoj de 298 448 gld. (260 378 en 1997) kaj neta gajno de 99 225 gld. (78 839). Al tio kontribuis rekorda kongresa librovendado (malnete 120 079 gld.), popularaj Malfermaj Tagoj de la CO kaj sukcesaj ofertokampanjoj. Krom la klientoj dum la UK, la Libro servo havis 758 poŝtajn aŭ

surlokalajn klientojn, kiuj faris 1568 mendojn. La abon servo peris 403 gazetabonojn (1997: 449), kun neta enspezo de 5385 gld.

Estis vigla jaro por la Eldona Fako. En marto aperis *Al lingva demokratio* (aktoj de la Praga Nitobesimpozio en 1996). Sekvis en majo reviziita eldono de la gvidilo *Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA* kaj, tuj antaŭ la UK, *Terminologia gvidilo* de H. Suonuuti, prelegaro de la Montpeliera IKU kaj *Esperanto post la jaro 2000* de A. Korĵenkov, kiel n-ro 1 en la serio *Diskutkajeroj*. Ili ĉiuj furoris en la kongresa libro servo (okt., p. 178). Fine

de novembro eliris, post multjara laboro, *Klara vortaro Esperanta-araba* de G. Abraham, krom la Unesko-libroj *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj* kaj *Kulturo kaj evoluo*. Malgraŭ nur unumonata vendado en 1998 ĉiuj tri eniris la pintoliston de la jaro (marto '99, p. 54). ♦



FINANCO

Kun atento al

La financa evoluo estis ĝenerale kontentiga en 1998. Plej multaj en- kaj elspezoj bone sekvis la buĝeton. Pluraj el ili realiĝis eĉ pli bone, ĉu kiel ŝparoj ĉu kiel pli grandaj enspezoj, tiel ke denove eblis flankenmeti gravan parton (44 500 gld.) de la kongresa licencpago al rezervo por postaj jaroj.

Maltrankviligas tamen la evoluo de kotiz-enspezoj. La kotizoj de individuaj membroj en la unujaraj kategorioj restis 11 523 gld. sub la buĝeto. La totalo de ĉiuj kotizoj tamen realiĝis laŭ la buĝeto, ĉar la kompenso el la Kapi-



Superlativa sukceso

Kun 3133 aliĝintoj el 70 landoj, la 83-a Universala Kongreso de Esperanto en la sudfranca Montpeliero (1-8 aŭg.) estis la plej amasa UK post la Jubilea Jaro 1987 kaj la deka plej granda inter ĉiuj. Ĝin karakterizis tre ekvilibra konsisto de kongresanoj, ĉar multaj venis el Orienta Eŭropo kaj relative granda nombro (15) el Afriko. Multaj aliĝintoj tamen malricevis vizon: problemo ĉiam pli ĝena kiam UK okazas en EU-lando.

La brila LKK, kun Claude Nourmont ĉekape, kreis unu el la plej kvalitaj produktoj en la UK-historio. La kongresejo Le Corum estis ideala por la bezonoj de UK. Dank' al ĝia situo meze de la urbo la ekstera publiko ne povis ne rimarki la kongreson. Al tio kontribuis ankaŭ saĝe trafaj paŝoj de LKK, ekz. ekspozicio kaj teatraĵo en la urbodomo, koncertoj en la apudkongreseja promenejo kaj montrofenestra filatela ekspozicio.

La kongresa temo "Mediterraneo — ponto inter kulturoj" estis traktita funde kaj diversfacete, sub reĝisorado de Renato Corsetti. Ĝi dominis la programon ne nur per kunsidoj speciale titolitaj kiel



kongrestemaj. Multaj prelegoj pri Francio kaj pri minoritataj lingvoj de la regiono ja ligiĝis al ĝi.

En la kleriga programo elstaris IKU 8-prelega, sub la rektoreco de d-rino Barbara Despiney, kaj tri kursoj komunaj de AIS kaj IKU. La artan programon kompetente organizis Floréal Martorell helpe de same kompetenta granda teamo. Laŭ vario kaj riĉo ĝi povis kontentigi ĉiujn gustojn, kaj ĝia nivelo estis profesia.

Bone sukcesis la Internacia Infana Kongreseto, kiun partoprenis 46 infanoj el 19 landoj. Ĝi bele kronis la multjaran laboron de Kristoforo Fettes, fininta per tiu IIK sian UEA-komisiitecon pri infanaj aferoj. Por infanoj ekster IIK funkciis vartejo en Le Corum. Tiu servo, zorge de gepatroj mem, montriĝis ripetinda.

La buntan junularan programon partoprenis pli ol ducent gejunuloj. La organizantoj konceptis ĝin kun la celo integri la junularon en la ĝeneralan programon. Fakte, la aĝostrukturo de la UK estis sufiĉe ekvilibra: ĝi certe ne donis impreson de kunveno de grizharuloj. Gejunuloj regis ankaŭ la bonege funkciantaj Gazetaran Servon, la kongresan kurieron *KoKo* kaj la interretan servon.

Streĉe laboris la loĝiga kaj ekskursiva servoj, kiujn gvidis la LKK-anoj Henryka Olek resp. Jean Hénin. Ĉar dank' al la sindonemo de LKK-anoj eblis minimumigi la uzon de profesiaj agentejoj, tiuj servoj esence kontribuis al la bonega financa rezulto de la UK. Post malprofito en Adelajdo, Montpeliero donis grandan gajnon, parte rezervotan por estontaj UK-oj, parte profitantan al la Propaganda Konto — pere de ĝi ankaŭ al Fondaĵo Canuto — kaj al Unuiĝo Franca por E-o. UFE, kiu en Montpeliero festis 100-jariĝon, plenmerite gajnis per la laboro de siaj aktivuloj rimedojn por sekure eniri sian duan jarcenton. ♦



talo Dumvivaj Membroj povis esti pli granda ol la buĝeto antaŭvidis. Same kiel jam en 1997, ankaŭ en 1998 la DM-kapitalo pagis al la spezokonto 70% de la nederlanda MA-kotizo por ĉiu dumviva kaj honora membro kaj honora patrono. En 1996 temis ankorau pri 50%. Dum multaj jaroj oni intencis kreskigis la kapitalon tenante la kompenson malalta. Tiu saĝa praktiko ebligas nun, kaj en la estonteco, pli grandajn elprenojn el la DM-kapitalo. Ili parte kontraŭpezos eblajn perdojn ĉe aliaj enspezoj.

La malkreska tendenco de membrokotizoj ĉiukaze restas grava problemo, ĉar ĝi minacas subfosi ĉiujn agadojn de UEA. Membrovarbado devas tial nepre ricevi seriozan atenton. Ĉar la tradicia sistemo de oficialaj perantoj ne plu funkcias kontentige, necesas urĝe revizii ĝin per "liberigo" de la kotizmerkato, t.e. duno de pluraj perantoj en sama lando. Tiu paŝo estas necesa, sed sola ĝi ne sufiĉos.

La plej pozitivan evoluon en 1998 sendube registras la bilanco, kun elstara pligrandiĝo de la Ĝenerala Kapitalo. Fine de 1997 ĝi estis 431 812 gld., sed en 1998 ĝi preskaŭ duobliĝis dank' al donacoj kaj heredaĵoj, sumaj je 397 531 gld. Tiu kresko atestas ne nur la apogon de la donacintoj kaj herediĝintoj al la celoj de UEA, sed ankaŭ

ilian fidon ke kontribuoj al la UEA-kapitalo estos serioze flegataj kaj longe profitos al la tutmonda movado. Kvankam la rentonivelo lastatempe emis fali, la granda kresko de la kapitalo tamen liveros al la spezokonto pli da rento-enspezoj.

Kiel plian sekurigon de enspezoj de estontaj spezokontoj oni plenumis en 1998 insistan rekomendon de la komitatataj reviziantoj, movante 20% de la kurzoŝanĝo de la antaŭa jaro en la Ĝenerala Kapitalo kaj Kapitalo Azio po trione al la spezokontoj de la kuranta jaro kaj la du sekvantaj jaroj. Oni ankaŭ faris ekstran amortizon je 75 000 gld. de librostokoj, kun la celo malaltigi la prezojn de titoloj kiuj nur tiamaniere povos esti pli rapide vendeblaj. ♦



LANDA AGADO

Eŭropo lamas, cetero flamas

Estrarano: Jegorovas, Triolle; poste Corsetti, Gbeglo

Eŭropo - Okcidenta

Kun kelkaj tre pozitivaj esceptoj (artikolo en *Le Monde*, nederlanda televidelsendo ktp) la situacio de Esperanto en okcidenta Eŭropo parte stagnas, parte malprogresas — malgraŭ grandaj klopodoj de niaj aktivuloj.

La nefunkciado de Eŭropa Esperanto-Unio estas miriga. Bonŝance en la pasinta jaro aktivuloj en tiu kampo entreprenis paŝojn por refunkciigi tiun instancon, kiu restas esenca por plua progreso de E-o tra Eŭropo kaj ne nur en Bruselo. La Laborgrupo pri la lingva problemo de EU prilaboris plu siajn du ĉefajn projektojn, NEIGHBOUR kaj RELAIS.

Tre danĝere ĝeneraligaĵas ideoj pri nur desuprismo agado. Alivorte, malsukcesinte konvinki sian najbaron lerni Esperanton, oni esperas konvinki Eŭropan Parlamenton.

Estas evidente ke EEU devas sukcesi puŝi la landajn asociojn al pli desubisma agado (kiel, cetero, konsilas al ni la eŭropaj parlamentanoj en ĉiuj okazoj) por ke la situacio ŝanĝiĝu.

Tiuj malpozitivaj rimarkoj ne signifas ke ni ne agnoskas la valoran laboron de centoj aŭ eĉ miloj da aktivuloj, kiuj en Eŭropo faras sian eblon por disvastigi Esperanton, per grandaj personaj penoj kaj financaj oferoj.

Eŭropo - Orienta

La situacio en ĉi tiu landaro estas, mildadire, tre varia, sed kelkaj landoj ja plu havas florantan E-movadon.


Pro la ekonomiaj baroj (salajra kaj preza malsameco) UEA ne sukcesas sufiĉe utiligi la labor-potencialon de orient-eŭropaj esperantistoj aŭ helpi la movadon tie evolui.

En la landoj mem tamen montriĝas pluraj signoj de konsciigo pri la nova situacio kaj pri klopodoj reorganizigi kaj kunlabori post la disfalo de la centre gvidataj agadoj.

Azio

La situacio en Azio ŝajnas almenaŭ pli stabila, se ne pli progresanta, ol en Eŭropo. Sub kunordigo de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) plivigliĝis kunlaboro inter la fortaj landaj asocioj. Aperis 3 n-roj de ĝia bulteno, *Esperanto en Azio*. La situacio de la movado restas relative bona en Barato kaj Pakistano, tre bona en Irano. Por utiligi la sperton de KAEM ankaŭ en junulara agado, estis fondita prepara laborgrupo por simila organo de landaj sekcioj de TEJO.

En la lasta parto de la jaro oni ekdonis atenton ankaŭ al la situacio en centra Azio, preskaŭ komplete blanka makulo sur la E-mapo. Tie kunefikas pluraj faktoroj: ekonomiaj malfacilaĵoj, politika malstabileco, kaj reislamiĝo.



La vigleco de la movado en Kubo meritis pli da raporto en nia revuo.

Araba mondo

Aperis post multjara laboro *Klara Vortaro Esperanta-Araba* de Georgo Abraham kaj prepariĝis por eldono la inversdirekta vortaro kaj lernolibro. Ili kune premisos disvastigon de Esperanto en arablingvaj landoj, kie ĝi ĉiam postrestis en burĝona fazo. Decembre UEA aperigis anoncetojn en angla- kaj arablingva ĵurnaloj de Jordano (kun 80 reagoj en 1999).



KAMPANJO 2000

Vasta akcepto

Estrarano: Lee, poste Corsetti

Kampanjo 2000 trairis kiel ruĝa fadeo praktike ĉion en la agado de UEA. Ĝojige estis ke preskaŭ ĉiuj landaj asocioj faris propran agadplanon aŭ adaptis ekzistantan planon konsiderante la celojn de la Kampanjo. Bela glumarko estis eldonita por diskonigi la Kampanjon. Artikoloj en pluraj nu-

meroj de *Esperanto* kaj praktike en ĉiuj E-gazetoj atestis pri la bona akcepto de la Kampanjo kaj ĝiaj celoj.

Kiel pintoj elstaris la festado de la 90-jariĝo de UEA per riĉ-programa Malferma Tago de la CO (jun., p. 104-105) kaj simpozio pri lingvaj rajtoj, ambaŭ fine de aprilo, krom Unesko-aŭspiciita simpozio en la UK (vd. pri ambaŭ "Eksteraj rilatoj", p. 112). En la UK kunsidis ankaŭ, unuan fojon, la Strategia Forumo de la E-Komunumo (sep., p. 158). Al ĝi aliĝis 65



fakaj asocioj, kulturaj centroj k.a. establoj. Ĉiuj trovis la ideon utila por fari el ĝi tradicion. La aktoj de la unua kunsido estis aperontaj en la serio E-Dokumentoj.

Kampanjo 2000 ricevis en 1998 donacojn sume je 48 077 gld. Oni elspezis 20 992 gld., sed multajn agadojn kovris aliaj kontoj aŭ fondaĵoj de UEA. La korea firmao Daewoo financis E-eldonon de la libro *Vastas la mondo, multas laboro* de sia fondinto Kim Woo-Choong, kies vendoprofito iĝos donaco al la Kampanjo. ♦

Afriko

Pliintensiĝis la streboj ke la afrikaj movadanoj mem fariĝu ĉefaj stirantoj de sia agado. Meĵloŝtona tiurilate, kaj samtempe signo de maturiĝo de la afrika movado, estis la unuafoja elekto de afrikano al



Komitato de Kuba Esperanto-Asocio

la Estraro de UEA. Okazis fundaj esploroj pri starigo de afrika "oficejo" de UEA. Montriĝis pli prudente realigi tiun ideon komence per venigo de afrika volontulo al la CO.

Ameriko

La E-movado en Ameriko ĝuas magian momenton. La landaj asocioj en Usono kaj Kanado restas bone organizitaj kaj vaste agantaj en la informada kampo. En suda Ameriko, interalie rezulte de la laboro de la Komisiono pri Amerika Agado, la movado vigliĝis multloke. En decembro la Komisiono lanĉis propran bultenon, *AktivAmeriko*. Sudamerikanoj ŝajnas havi la kapablon ekspluati la novajn komunikajn teknikojn. En pluraj landoj ili starigis komputilajn diskutistojn por la landaj aktivuloj.

Oceanio


La aŭstralia kaj nov-zelanda movadoj restis sur la konata bona nivelo. Fine de la jaro ekĝermis ideoj por kunligi kelkajn aktivulojn en la pacifikaj insuloj, por ekklopodi enpenetriĝi Esperanton ankaŭ tie. ◆



INFORMADO

Unuaj paŝoj en la reton

Estrarano: Kniivilä



Jam de pluraj jaroj multaj E-organizaĵoj kaj individuaj esperantistoj utiligas la tutmondan komputilreton por informado. Pasintjare ankaŭ UEA finfine entreprenis la unuajn paŝetojn direkte al pli efika uzo de la modernaj komunikiloj. Por korespondado la CO ja ekuzis retpoŝton jam tre frue, en 1992.

En majo la Informa Fako ĝojigis la redaktorojn de E-periodaĵoj per nova servo: la retpoŝtaj Gazetaraj Komunikoj de UEA. Ili raportas koncize kaj fidiinde pri freŝaj agadoj kaj atingoj de UEA, decidoj de la asociaj organoj, novaj eldonaĵoj de UEA ktp. Dum 1998 aperis entute 23 Gazetaraj Komunikoj kun 59 eroj.

Tiujn retpoŝtajn komunikojn povas laŭdeziro ricevi ankaŭ interesataj Membroj-Abonantoj, Dumvivaj kaj Honoraj Membroj. Redaktoroj sen retpoŝta aliro povas ricevi la tekstojn per ordinara poŝto.

Fine de la jaro komenciĝis ankaŭ la laboro por la starigo de oficiala paĝaro

de UEA en la Tut-Tera Teksaĵo. La ankoraŭ tre provizora paĝaro de UEA estas jam videbla ĉe <http://uea.org>. Tie troviĝas ankaŭ la tekstoj de la Gazetaraj Komunikoj.

La Universala Kongreso, kiel kutime, vekis relative grandan intereson de la amaskomunikiloj. La prestiĝa franca ĵurnalo *Le Monde* tamen mise informis ke la UK estas la sola okazo dum la jaro kiam la daŭre ŝrumpanta esperantistaro povas uzi sian lingvon. Post amasaj protestoj la sama gazeto aperigis tutpaĝan, ĝenerale favoran artikolon pri Esperanto.

La informada rubriko *Influo* aperis en la revuo *Esperanto* trifoje, kiel planite. De la anglalingva informilo *An Update on Esperanto* produktiĝis ĝisdatigita versio. Malgraŭ alvokoj al landaj asocioj ĝi daŭre apenaŭ estas tradukita al aliaj lingvoj, dum la Manifesto de Prago ekzistas en kelkdeko da lingvoj kaj estas multe uzata en informado. ◆



EKSTERAJ RILATOJ

Homrajta jubileo en fokuso

Estrarano: Lee kaj Fettes, poste Enderby

En pli longa perspektivo la plej grava atingo en 1998 estis la asigno de specialaj konsultaj rilatoj al UEA ĉe Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok) de UN (jul.-aŭg., p. 126). De 1985 UEA havis ĉe UN la statuson de konsultaj rilatoj, sed lige kun la revizio de la NRO-rilatoj de UN en 1997, UEA estis envicigita inter la t.n. listigitaj NRO-j. Dosiero kompilita de la CO pri la agado de UEA kaj ĝia kontribuo al la celoj kaj agado de UN konvinkis Ekosok pri la utilo promocii UEA.

Post iom tumulta periodo tiukampe, UEA nun ĝuas oficialajn rilatojn kun ses internaciaj organizaĵoj: specialajn konsultajn kun UN, operaciajn kun Unesko, konsultajn kun UNICEF kaj Konsilio de Eŭropo, ĝeneralajn kunlaborajn kun Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj kaj kontaktajn en kategorio A kun la Teknika Komitato TC 37 de Internacia Organizo por Normigado (ISO). Neoficiale aŭ okaze UEA rilatas kun pluraj aliaj.

La plej grava unuopa evento estis la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj ◆

KULTURO

Kvalita rikolto


Estrarano: Triolle, poste Lipari

Ankaŭ en 1998 la kultura ĉef-evento en la E-komunumo estis la UK, kun abunda arta programo kaj Tago de la E-libro. La UK ankaŭ fonis al unuhora filmo de nederlanda televido, en kies realigo CO-oficistoj proksime kunlaboris (dec., p. 213). Gazetoj multlande atentis ke William Auld estis kandidatigota por literatura Nobel-premio. La e-istoj mem donis plian distingon al Auld, Honora Membro de UEA: voĉdono de la revuo *La Ondo de Esperanto* sankciis lin "e-isto de la jaro".

Belartaj Konkursoj (okt., p. 173) allogis 118 konkursaĵojn (76 en 1997). Ankaŭ kvalite la rikolto estis bona: en ses el la sep branĉoj oni aljuĝis la unuan premion; en 1997 nur en tri. Trian fojon sinsekvon la premio Nova Talento (por aŭtoro neniam gajninta "ordinaran" premion) ne estis aljuĝita, sed en poezio kaj kanto ja venkis unuafaj konkursantoj.

Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorssen ricevis 15 subvencipetojn. Sume je 4200 gld. ĝi pliriĉigis 10 E-kolektojn, per subvencioj de 200 ĝis 500 gld. (jan. '99, p. 17). Subvencion Cigno (7345 gld.) ricevis Vjetnama E-Asocio por la eldono de granda E-vortaro de Nguyen Minh Kinh kaj por la organizado de la

2-a Azia E-Kongreso (1999). Per Premio Onisaburo Deguĉi (4000 gld.) UEA omaĝis al la agado de Helga Farukuoye por la E-movado en Niĝerio. Ekster UEA, la germana FAME-fondaĵo distingis Marjorie Boulton per



Se ankaŭ tiel eblus partopreni la kantan branĉon de Belartaj Konkursoj...

kulturpremio (apr., p. 68), dum OSIEK premiis Claude Piron pro *La bona lingvo* kaj honor-diplomis Maria Becker-Meisberger pro *Internacie kuiri* (okt., p. 175).

En la serio "Oriento-Okcidento", per kiu UEA kontribuas al la programo de Unesko pri reciproka aprezo de kulturoj, aperis ĉe Fonto du volumoj de *Antologio latina* (redaktis kaj tradukis Gerrit Berveling). Pro la eksterordinare bona debito de la libroservo (vd. "Administrado: Servoj", p. 108) indas reliefigi ĉi-loke la ŝlosilan rolon de tiu servo de UEA en la E-kulturo. ◆

lan seminarion organizis Korea Esperanto-Asocio kun Korea Lingvistika Asocio en Seulo decembre (feb. '99, p. 28) kaj TEJO eĉ dufoje (vd. "Junularo").

Al la jubileo de la Universala Deklaracio omaĝis ankaŭ la E-eldono de la Unesko-libro *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj*, same kiel subskrib-kolektado de Japana E-Instituto, aŭspiciata de UEA (feb. '99, p. 28). Aperis ankaŭ *Kulturo kaj evoluo*, plia libreto

FAKA AGADO, SCIENCO

Atento al term

Grava atingo de Terminologia E-Centro de UEA (TEC) en la 80-aj jaroj estis la starigo de funkciaj rilatoj inter UEA kaj la terminologiaj medioj, kiel Infoterm kaj la Teknika Komitato TC 37 de Internacia Organizo por Normigado (ISO). Ankaŭ sekve de ili Esperanto grave rolis en la realigo de (duobla) konferenco memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Eugen Wüster, aŭguste en

EDUKADO

Al kulturo de paco

Estrarano: Triolle, poste Chrdle

Laŭ interkonsento farita en 1990, ILEI zorgas pri la eduka laboro de UEA rilate al instruado kaj ekzamenoj de E-o. Tiun taskodividon prilumis artikolo de la nova ILEI-prezidanto Maŭro La Torre (nov., p. 188).

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, kies gvidilo aperis en reviziita eldono, okazis en Italio, Francio (2 sesioj), Usono, Madagaskaro kaj Togolando. El 49 kandidatoj de la elementa kaj 23 de la meza niveloj sukcesis 16 resp. 18. La nombro de rajtigataj ekzamenantoj kreskis al 57.



Homaj Rajtoj, organizita de UEA sub aŭspicioj de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj (jun., p. 102-103). Ĝi okazis en la Ĝeneva sidejo de UN, Palaco de Nacioj, la 28-an de aprilo, omaĝe al la tiutaga 90-jariĝo de UEA kaj la samjara 50-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kvindek da partoprenantoj, i.a. flanke de UN-instancoj kaj NRO-j, aŭdis prelegojn de eminentaj lingvo- kaj homrajtaj specialistoj. Simi-

de Unesko pri la temoj de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. UEA-representantoj Christer Kiselman, Roland Lindblom kaj Bengt Nordlöf partoprenis aprile Unesko-konferencon pri "Kulturaj strategioj por evoluigo" en Stokholmo (maj., p. 85). En novembro delegacio de UEA, kune kun tiu de ILEI, partoprenis en la Pariza Unesko-domo la konferencon de NRO-j kun oficiala statuso ĉe Unesko (dec., p. 209).

inologio

Estrarano: Wandel, poste Chrdle



Vieno (okt., p. 180-181). Internacia E-Muzeo rolis kiel unu el la organizantoj, dum UEA estis oficiala subtenanto.

Ankaŭ ene de la movado videblis la strebo doni pli da atento al faka terminologio. Novembre okazis en Prago, sub aŭspicioj de UEA kaj ISAE, la 1-a Kollokvo pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (feb. '99, p. 29). Pli ol duono de ĝiaj kontribuajoj traktis terminolo-

giajn temojn. En plua agado necesas zorge konsideri la spertojn, bonajn kaj malbonajn, de TEC, adaptante la metodojn al la novaj komunikaj ebloj.

Aktivaĵo de TEC estis la E-eldono de *Terminologia gvidilo* de Heidi Suonuuti, eminenta fakulo de ISO, kiu mem intense partoprenis ĝian adaptadon al Esperanto. Tiu gvidilo ebligas al E-terminaristoj profesion alpaŝon al sia laboro. Kun la Teknika Komitato TC 37 de ISO, kies gvidanto Suonuuti estis dum multaj jaroj, plu daŭris regulaj kontaktoj. En aŭgusto Roland Lindblom partoprenis nome de UEA kiel observanto en ĝia jara kunsido, en Stokholmo.

Post la Strategia Forumo de la E-

Komunumo en Montpeliero okazis diskuto kun rete atingeblaj reprezentantoj de fakaj kaj sciencaj organizaĵoj, surbaze de dissendita demandilo. Perletera diskuto estis daŭrigota kun ĉiuj ceteraj post la prilaboro kaj ordigo de la unuaj rezultoj.

Kiel apliki bone E-on sen truda propagando, ekzemplas Internacia Tradukreto per E-o — utila al ne-esperantistoj, ĝi uzas Esperanton pontlingve kaj e-istajn parolantojn de la koncernaj lingvoj kiel tradukantojn — aŭ la projekto de Internacia Naturkuraca Asocio por trejni naturkuracistojn per E-o. En terminologio elstare rolas E-o en *Lexicon Silvestre*, forstista projekto (okt., p. 180-181). ♦

En 1998 ILEI havis 753 membrojn. En la konferenco en Montpeliero (okt., p. 176) ĝi ricevis du novajn sekciojn (Irano kaj Pollando) kaj novan estraron.

La kongresa temo "Lingvolernado, ponto inter kulturoj" kontribuis al la planado de la projekto Interkulturo, kadre de kiu oni instruos E-on en lernejoj cele al ties utiligo por kultura interŝanĝo inter lernejoj. Komuna kun UEA, ĝi enŝanĝas en la Lingvapax-projekto de Unesko. Aliĝis al ĝi jam pli ol 30 lernejoj en kvin kontinentoj.

Kiel materialojn por ĝenerala edukado UEA eldonis du Unesko-verkojn kaj provizoran version de studkajero pri la Manifesto de Prago. Evidente, ni devas ĉiam pli intensigi niajn strebojn ĉi-rilate, ĉar edukado al "kulturo de paco" iĝas urĝe necesa, kiam armila solvo de malkonsentoj emas reĝi normo en la internacia komunumo. ♦

Kadre de la Montpeliera UK, simpozio sub aŭspicioj de Unesko traktis lingvopolitikon kaj interkulturan edukadon (okt., p. 171). Prelegis i.a. Philia Thalgott (Konsilio de Eŭropo); alparolis Eryl McNally, brita membrino de Eŭropa Parlamento.

Vicprez. de Korea E-Asocio, Chongsae Lee, partoprenis en septembro preparakunsido de Internacia Konferenco de NRO-j en konsultaj rilatoj kun UN (dec., p. 209), okazonta en oktobro 1999. ♦



JUNULARO

Nuboj super 60-jariĝo

Estrarano: Lipari



TEJO spertis gravan falon de sia membraro. Tiu de individuaj membroj (de 892 en 1997 al 728) estas parte, kvankam ne ĉefe, klarigebla per la malpli granda IJK en 1998. Tre maltrankviliga estas la malmultiĝo de aligitaj membroj (de 2512 al 1959). En 1991, kiam la ĉefa ondo de la membrara falo en Orienta Eŭropo estis jam pasinta, TEJO ankoraŭ havis 4026 aligitajn membrojn. (En 1990 temis pri 6329.) Dum sep jaroj tiu nombro ŝrumpis 51%; tiu de la ceteraj aligitaj membroj de UEA "nur" 28%. Tiu tendenco postulas urĝan atenton ne nur de la centraj organoj de UEA sed precipe de la landaj asocioj, el kiuj multaj tute neglektas la junularan agadon.

La nombro de aliĝintaj landaj sekcioj iĝis 40 post la akcepto de Litova E-ista Junulara Ligo.

Malgraŭ diversaj subvencioj el oficialaj eŭropaj fontoj, TEJO plu luktis kun financaj problemoj. Tre bonvena estis do la apogo de 100 Patronoj kaj 13 Dumvivaj Patronoj (en 1997 resp. 101 kaj 12).

La eksteraj rilatoj de TEJO plu estis viglaj, kvankam eksentebis nesufiĉo da aktivuloj. Trejnado de novuloj helpas nova eldono de la manlibro de Kom-

silio pri Eksteraj Rilatoj. Krom konsilioj por "ambasadori" ĉe eksteraj instancoj, ĝi enhavas i.a. 5-lingvan terminaron de tiu kampo. En aŭgusto prezidanto Jozefo Truong kaj Enĉi Barković reprezentis TEJO-n en la 3-a Monda Forumo de Junularo de UN en Braga, Portugalio (nov., p. 191), kie TEJO kunordigis laborgrupon pri la integrado de junularaj organizaĵoj en la UN-sistemon.

La 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj TEJO markis eĉ per du seminarioj. "Homaj rajtoj sub premo" estis la temo en la eŭska ĉefurbo Vitoria/Gasteiz (25 apr. — 2 majo), dum en la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto oni traktis (16-19 nov.) pri "Lingvaj rajtoj — lingva politiko" (dec., p. 208). En ĉi lasta kvar ideodokumentoj estis kreitaj kiel bazo por ankoraŭ difinita lingvopolitiko de TEJO.

La agadjaro kulminis en la 54-a Internacia Junulara Kongreso en la kroata Rijeka (25 jul. — 1 aŭg.) kun 378 aliĝintoj. Krom lerni pri la temo "Amaskomunikiloj — kreantoj de amaskulturo", la kongresanoj festis la 60-jariĝon de TEJO. ♦

(Detalan jarraporton de TEJO vd. en TEJO tutmonde, n-ro 3/1999.)



LINGVO, ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Eldone kaj prelege

Estrarano: Fettes, poste Corsetti



La plurlingva revuo *Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado (LPLP)* de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, eldonata de prestiĝa nederlanda firmao, John Benjamins, ricevis novan ĉefredaktoron, prof. Marc van Oostendorp. Post glata ŝanĝo, la

trinumera volumo (309 p.) povis prespretiĝi en la CO preskaŭ akurate. Problemoj ĉe la eldonejo tamen prokrastis la aperon de la tria numero al aprilo 1999.

La nuna, tria serio de la alia CED-eldonaĵo, *Informilo por Interlingvistoj (Ipl)*, plu estis kompetente redaktata de

d-ro Detlev Blanke. Ĝia sepa jarkolekto havis 4 numerojn kun 80 paĝoj.

La 51-a sesio de Esperantologia Konferenco en la Montpeliera UK temis pri la reciprokaj atendoj de (lingvaj) fakuloj kaj la E-movado (okt., p. 177). Prelegis Natalia Dankova, Maŭro La Torre, Humphrey Tonkin kaj kunordiganto Marc van Oostendorp. Christer Kiselman prezentis sian projekton pri nova dulingva scienca periodaĵo, *Esperantologio / Esperanto Studies*, kies redakta komitato arigas eminentajn esperantologojn (jan. '99, p. 18). ♦



FINANCAJ ALDONAĴOJ

Spezokonto

Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.

Rezulto		Kostoj		Rezulto	
1997		1998		1998	
490860	Salajroj	515000	504201	504201	
93574	Socia asekuro	90000	98234	98234	
12156	Suplementoj	18200	13065	13065	
1794	Kafo, teo, lakto	2000	1614	1614	
0	Malsankompenso	0	0	0	
7000	Pensiaranĝo	5000	7000	7000	
605384	Salajroj ktp, nete	630200	624114	624114	
10195	Afranko, nete	14400	19008	19008	
6074	Telekomunikiloj	6500	5360	5360	
5319	Presajfoj	8900	3689	3689	
5957	Materialoj	7000	8401	8401	
6324	Maŝinoj, riparo/prizorgo	6700	6541	6541	
1500	Revizoro	1500	1500	1500	
1269	Administrataj kostoj	1200	301	301	
6302	Kopiado	7500	5293	5293	
-3747	Kopiado (vendoj)	-6000	-4006	-4006	
39193	Centra Oficejo, nete	47700	46087	46087	
10829	Gasoj, elektro	10400	10944	10944	
1242	Akvo	550	681	681	
234	Riparo de la Domo	1600	1643	1643	
7828	Purigado	8000	7803	7803	
6120	Asekuro	6500	6142	6142	
3280	Impostoj je la Domo	3400	3105	3105	
-1541	Luo ricevita	-1950	-2440	-2440	
27992	Oficeja Domo, nete	28500	27878	27878	
36180	Preskostoj <i>Esperanto</i>	38000	36850	36850	
23858	Grafiko	24000	24426	24426	
50300	Dissendo/kovertoj	57950	48359	48359	
-5750	Anoncoj	-10850	-4681	-4681	
104588	Esperanto, nete	109100	104954	104954	
15794	Preskostoj Jarlibro	20000	17151	17151	
17954	Dissendo/kovertoj	21600	19454	19454	
4420	Grafiko	5000	4840	4840	
-14567	Anoncoj	-16000	-14722	-14722	
23601	Jarlibro, nete	30600	26723	26723	

12816	Preskostoj <i>Kontakto</i>	14300	5791	5791	
9277	Dissendo/kovertoj	8450	14932	14932	
7360	Grafiko	16050	4552	4552	
13000	Redakto	6000	6390	6390	
-16	Anoncoj	-600	-63	-63	
42437	Kontakto, nete	44200	31602	31602	
12916	Estraroj (vojaĝado)	12000	13443	13443	
1605	Estraroj (korespondado)	3000	5445	5445	
5208	Oficistoj (vojaĝado)	5000	2607	2607	
3631	Vojaĝado (UK)	5000	1254	1254	
23360	Vojaĝoj/korespondado	25000	22749	22749	
3000	Edukado	3000	3000	3000	
3029	Informado	3500	1103	1103	
1478	Eksteraj rilatoj	3500	1652	1652	
1631	Komisiitoj, vojaĝoj	2000	1597	1597	
120	Komisiitoj, korespondado	1500	201	201	
9258	Movada evoluigo	13500	7553	7553	
2605	Bankokostoj	2000	2953	2953	
-6804	Kurzodiferencoj	0	-1457	-1457	
3707	Reprezentado	5000	1913	1913	
-21	Antaŭaj jaroj	0	7473	7473	
79	Diversaj kostoj	500	246	246	
-434	Ĝeneralaj kostoj	7500	11128	11128	
6609	Amortizo, domo	6500	6477	6477	
3122	Amortizo, aparatoj/mebloj	2900	2821	2821	
791	Amortizo, telefonsistemo	600	593	593	
10067	Amortizo, komputiloj	8500	8551	8551	
5715	Amortizo, programaro	4200	4441	4441	
26304	Amortizo entute	22700	22883	22883	
901683	Sumo de la kostoj	959000	925671	925671	

Rezulto		Rimedo		Rezulto	
1997		1998		1998	
5905	Membroj Gvidlibro	5800	6001	6001	
43501	Membroj Jarlibro	52000	60363	60363	
265596	Membroj-Abonantoj	277000	264157	264157	
66780	Dumvivaj Membroj	53000	68495	68495	
17030	Membroj Jarlibro (junaj)	15800	13330	13330	
17103	Membroj-Abonantoj (junaj)	21300	16526	16526	
415915	Kotizoj de individuaj membroj	424900	428872	428872	

ESTRARA RAPORTO 1998

18623	Aligitaj membroj	18500	19048
3703	Aligitaj membroj junaj	3500	2971
9342	Abonoj <i>Esperanto</i>	8700	9061
1029	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	1300	2379
15258	Abonoj <i>Kontakto</i>	16000	14162
7560	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	7000	5950
44943	Societo Zamenhof	46500	43636
6200	Fakaj Organizaĵoj	6250	6386
-7819	pago al TEJO	-7850	-6470
514754	Kotizoj	524800	525995
260378	Vendoj de la Libroservo	270000	298448
-175140	Kosto de varoj venditaj	-173500	-192953
85238	Libroservo, malnete	96500	105495
-4000	Katalogokostoj	-4000	-4000
-2399	al stokrezervo	-2400	-2269
4481	Abonfako	7000	5385
83320	Libroservo, nete	97100	104611
38665	Vendoj de Eldona Fakoj	35000	35089
-29163	Aldonoj (novaj libroj)	-10000	-23888
8783	Ŝanĝo stokvalora	-12750	1554
-3885	al stokrezervo	-3850	-3867
-1493	Tantiemoj	-2000	-1315
12907	Eldona Fakoj, nete	6400	7573

49362	Grafikaj servoj CO	63000	47278
20235	Aliaj servoj CO	5500	8088
0	Programado	2000	0
1500	Instituto Hodler	1500	1500
30500	Kompenso Propaganda Konto	30500	30500
0	20%a ĝustigo: laŭ kalkulo	0	31647
0	20%a ĝustigo: al rezervo	0	-31647
101597	Servoj kaj Kompensoj	102500	87366
82373	Kotizoprocenĵo UK	150000	188843
24500	Rezervo	6000	-44500
24103	Turismo	10000	0
24707	Rento, nete	33500	27367
10800	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	9500	9400
2863	Aliaj enspezoj	1700	1934
169346	Diversaj enspezoj entute	210700	183044
881924	Sumo de la rimedoj	941500	908589
19759	Saldo	17500	17082
901683	Sumo de la kostoj	959000	925671



Pasivoj

Kapitalo	451572	794387
Saldo de spezkonto	-19759	-17082
Kapitalo Azio	<u>739261</u>	<u>714141</u>
Kapitalo, Ĝenerala kaj Azio	1171074	1491446

Kapitalo Dumvivaj Membroj	1096443	1147856
--	----------------	----------------

Rezervo, debitoraro	23229	23932
Kongresa Rezervo	115279	130384
Rezervo IJK	16667	11111
Rezervo, emeritaj oficistoj	92468	18854
Aliaj sumoj rezervitaj	<u>106097</u>	<u>316695</u>
Rezervoj entute	353740	500976

Apogo Thorsen	32639	29563
Belarta Fondaĵo	144966	152744
Fondaĵo Afriko	1564	4120
Fondaĵo Ameriko	39881	43700
Fondaĵo Azio	1661	1874
Fondaĵo Biblioteko	19711	19726
Fondaĵo Canuto	6544	8185
Fondaĵo Grabowski	69520	65599
Fondaĵo Junularo	17000	21559
Fondaĵo Saliko	56925	59254
Fondaĵo Wüster	3418	3418
Konto Espero	13906	14339
Propaganda Konto	18180	61810
Triamonda Kongresa Fondaĵo	68246	67964
Volontula Fondaĵo	<u>68156</u>	<u>71583</u>
Fondaĵoj entute	562317	625438

Antaŭricevitaj rimedoj	245749	280964
Pagotaj kostoj	54650	67150
Pendantaj spezoj	12818	10455
Kreditoroj	<u>1332762</u>	<u>1448509</u>
Deponoj de membroj	<u>963750</u>	<u>1206650</u>
Kreditoroj k.s. entute	2609729	3013728

Sumo de la pasivoj	5793303	6779444
---------------------------------	----------------	----------------

Bilanco

Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.
Por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1997.

Aktivoj

	1997	1998
Domo, Roterdamo	323828	317351
Tereno Aspremont	<u>1</u>	<u>1</u>
Nemoveblaĵoj	323829	317352
Ekipaĵoj kaj mebloj	19322	17159
Komputilaj aparatoj	23488	19969
Programaro	17146	13322
en Novjorko	<u>1</u>	<u>1</u>
Maŝinaro ktp	59957	50451
Blokigitaj monrimedoj	3795	3737
Akcioj	764194	524658
Obligacioj	881450	1093750
Miksaj	<u>1139387</u>	<u>1179911</u>
Valorpaperoj entute	2785031	2798319
Stokoj libroservaj	239847	226920
Stokoj, Eldona Fakoj	388449	386748
Stokrezervo	-6367	-87503
Presajoj, materialoj k.s.	<u>13339</u>	<u>14989</u>
Provizoj entute	635268	541154
Ricevotaj rimedoj	107439	94529
Antaŭpagitaj kostoj	10990	22177
Debitoroj	<u>222527</u>	<u>329267</u>
Debitoroj ktp entute	340956	445973
Ŝparkontoj kaj deponoj	1422188	2265173
Kurantaj bankokontoj	216861	349371
Kasoj diversaj	<u>5418</u>	<u>7914</u>
Kasoj/bankokontoj entute	1644467	2622458
Sumo de la aktivoj	5793303	6779444

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO 1998

Kaj plue...



DANIO: Rapidu al rokfestivalo

La Esperanta rok-grupo JoMo kaj la Liberecanoj koncertos en la 5-taga rok-festivalo Midtfyns (Ringe, 7-11 julio, kun ĉ. 40 000 partoprenantoj). E-istoj havos propran tendaron jam de 5 julio, renkontiĝejon kaj informbudon. Informoj ĉe Jacob Nordfalk (✉ nordfalk@alf.nbi.dk) kaj ĉe <http://ttt.esperanto.dk/eo/mf/>.

KUBO: Festivale, diligente

De 20 ĝis 22 nov. '98, Santiago de Cuba gastigis pli ol 120 e-istojn dum sia 2-a Kultura Festivalo. La eventon antaŭis monato da informado: afiŝoj, aperoj en radio kaj en televido — konstante dum la plej spektataj horoj en la du naciaj kanaloj. Prelegis i.a. Juan

Lázaro Besada (pri E-o en la internaciaj rilatoj), Maritza Gutiérrez (pri José Martí) kaj Fernando Paredes (E-o kaj piĝinaj lingvoj).

- Por la 3-a Nacia Kongreso de Kuba E-Asocio (Havano, 11-13 marto) kunvenis ĉ. 150 homoj, el ili deko da eksterlandanoj. Elektigis nova estraro, kun prezidantino Maritza Gutiérrez.

- Novaj bultenoj aperas ĉe provincaj filioj: *La Esperanta Perlo* (Cienfuegos) kaj *La Famo* (Guan-tánamo). En Sancti Spíritus la loka radio elsendas de 22 apr. ĉiŝaŭde, kadre de kultura programo, 5 minutojn da E-informoj.

- "Datumreto de publikaj mesaĝoservoj de Kubo" legeblas en E-o ĉe http://www.infocom.etecsa.cu/esperanto/Afuera_esp.htm/. (KEA, N. Díaz Guevara, Ret-Info)

UKRAINIO: 11-a artĝuo

En la internacia festivalo EoLA-11 (5-9 marto, apud Kievo) 110 partoprenantoj (preskaŭ trione infanoj) el 8 landoj ĝuis arton, i.a. de pupisto Sergej Jefremov, de kantistoj Georgo Handzlik, JoMo, Pavel Korotenko kaj Mihail Povorin, kaj de grupo de polaj infanoj sub la gvido de Ewa Bondar. (M. Lineckij, K. Demjanenko, *Helianto*)



TIRINARO: Korea liberpoeto

En la unua "Tago de Pioniroj" (evento kiun iniciatis LEE Chong-Yeong, prez. de Korea E-Asocio), la 15-an de majo en Seulo, oni rememoris pri Dan Tirinaro (Ĝong Sasop, 1910-44), kies originala poemaro *La Liberpoeto* aperis en Parizo, "en la somero brulanta de 1938^a" (represita en 1975). Nun, per kore-lingvaj tradukoj de KIM Uson kaj KIM Yocho, kompletigis la dulingva libro *Birdoj sen flugiloj*, kiu enhavas 52 el la 105 poemoj de *La Liberpoeto*. Post parolado de Lee, prof. So Gil-su detale prezentis la poeton kaj lian verkon. Partoprenis familianoj de Tirinaro kaj pli ol cent e-istoj. (Ĉongsae Lee)

LERNADO DE 88-JARULO

Jam elĉerpiĝis *Tempesto super Akonkagvo* de Tibor Sekelj en la japana, kiun en 1990 publikigis la eldonejo Hukuinkan Syoten, laŭ instigo de e-ista redaktoro, HUKUNAGA Makiko. Tial en julio ĝin reeldonos la prestiĝa Tiku-ma Syobō, laŭ rekomendo de la eminenta eseisto KUSIDA Magoiti. Temas pri traduko kiun la senlaca KURISU Kei faris helpe de sia filo Akane, amatora alpinisto.



Kurusu en Vjetnamio en 1975

Arkivo de UEA/Tasavias Yodanis

BRITIO: 7-landa internacieco

130 homoj el 7 landoj ĉeestis la 83-an Britan Kongreson de Esperanto (2-5 apr., Newport, Kimrio), kio decidigis lokan ĵurnaliston raporti pri "kongreso internacia". Prelegis i.a. Reza Torabi (Irano), Werner Pfennig (Germanio) kaj Atilio Orellana Rojas (Argentino/Nederlando), kiu ankaŭ gvidis Cseh-kurson. En konstruata komerca kvartalo de Newport oni inaŭguris la novan straton Esperanto Way. (H. Chapman)

Reza Torabi (Irano) salutas la britan kongreson.

KONCIZE: por via notlibro

Koncize, la eŭropa junulara bulteno, havas novan redaktoron: Lévin Delnatte, An der Kittelburg 15, DE-51469 Bergisch Gladbach, Germanio; ☎49/2202/22-739; ✉+49/89/666-173-698-512; ✉koncize@esperanto.org.



VERKISTOJ: PEN-deklaro

• Pri "La Esperanta: ĉu literaturo por paco?" parolis Giorgio Silfer, vicprezidanto de Esperanta PEN-Centro, en la 32-a Internacia Literatura Konferenco de PEN Internacia (Bled, Slovenio, 19-21 majo). La Komitato de EPC sekve lanĉis "Deklaron pri la milito en la nuna Jugoslavio", kiu i.a. invitas ĉiun E-lingvanon "kondukti ne kiel juĝisto, sed kiel atestanto" kaj E-verkistojn "ree vigliĝi laŭ la literatura elano kiu kondukis al ĉefverkoj kiel *La infana raso* de William Auld kaj *La granda kaldrono* de John Francis", ĉar "necesas ke nia literaturo ree estu en la unua vico por konstrui [...] kulturon de paco." (Heroldo Komunikas — HeKo)



FINNLANDO: Leteroj per E-o

• La ĉefa svedlingva ĵurnalo *Hufvudstadsbladet* publikigis la 2-an de apr. "Leteron el Serbio" de Zoran Ĉiriĉ, kunlaboranto de *Kontakto*, en svedigo de ĉi ties redaktoro, Sabira Ståhlberg.

• Du aliaj leteroj de Ĉiriĉ aperis finne la 31-an de marto en la mezfinnlanda regiona gazeto *Keskipohtanmaa*, en traduko de Raita Pyhälä. (S. Ståhlberg)

FRANCIO: Muziko por l'oreloj

La kantisto Guy Béart (vd. sep. '98, p. 162) reesprimis sian fidon al Esperanto en du aprilaj radio-intervjuoj, ĉe Europe 1 kaj ĉe France Inter. (*Espéranto - Ile de France*)

• La 14-an de majo ACEC (Profesia Asocio de Verkistoj de Katalunio) elektis kiel sian prezidanton, por kvar jaroj, la esperantlingvan verkiston Manuel de Seabra. Kun pli ol 300

MUZIKO: Amikaro hiphopa

La 20-an de aprilo aperis nova disko de Freundeskreis, furora hiphop-bando germana (<http://www.sels.com/freundeskreis>).



La 66-minuta albumo nomiĝas *Esperanto*, kun la subtitolo *Amikaro* (Esperanta traduko de "Freundeskreis"). La plejparte germanaj tekstoj enplektas esperantlingvajn fragmentojn, per la voĉo de Jean Codjo, esperantisto el Benino. "Temas pri hiphopo kiel lingvo de la internaciema junularo. Esperanto estas lingvo evoluigita el multaj diversaj eŭropaj lingvoj, rapide lernebla. Por mi hiphopo funkcias ĝuste tiel" — klarigas bandano. (W. Klag, Ret-Info, *Esperanto Aktuell*, *Uncle Sally's Magazine*)

ZEO: Esperanta strat-plato

Dum la 54-a kongreso de SAT-Amikaro, la SAT-organizaĵo por franclingvaj landoj (3-5 apr., Glaj, 171 partoprenantoj), la urbestro-senatano de Montbéliard, Louis Souvet,



inaŭguris jam ekzistantajn tabulojn de la strato Zamenhof. Nome, ili estis refaritaj kaj korektitaj: de "Zamenhoff" al "Ludwik Zamenhof". Sur la novaj nomplatoj tamen aldoniĝis eraro en la klarigo: "kreinto de Esperento".

(SAT-Amikaro)

membroj (ankaŭ german-, polkaj ĉinlingvaj), ACEC defendas la profesiajn rajtojn de la verkistoj

loĝantaj en Katalunio, sendepende de la lingvo kiun ili uzas. (M. de Seabra)

IRLANDO: Mortinta anaso?

• Post 37 jaroj da seninterrompa prezentado de ĉiutaga radio-programo, la 21-an de majo retiriĝis Gay Byrne, la plej ŝatata kaj influa dissendisto de la irlandaj amas-komunikiloj (surbilde: antaŭ 37 jaroj kaj nun). Neniam li timis temojn tiklajn por la katolika Irlando, kaj eble neniu unuopulo kontribuis pli ol li al la etos- kaj opini-ŝanĝoj en Irlando. Nur unu temon Byrne



ĉiam rifuzis diskuti, malgraŭ jaroj da esperantistaj konvinkoklopojoj. Homo alie tolerema, larĝmensa, Byrne opiniis: "Esperanto estas mortinta anaso. Ĝi ne havas estontecon."

• Raidio na Gaeltachta elsendis (29

majo) iom longan intervjuon pri E-o kaj Zamenhof. La gaellingvaj radio kaj gazetaro ne malofte pritemas E-on, kontraste al malalta intereso ĉe anglalingvanoj. (G. MacAoidh)

HUNGARIO: Armeo, prizono

• Kiam Hungario estis aliĝonta al NATO, Péter Kozma artikolis en *Új Honvédségi Szemle*, revuo de la hungara armeo, pri la interarmea uzindeco de E-o. (P. Kozma)

• Tutpaĝa intervjuo kun Oszkár Princz (sekretario de Hungara E-Asocio), pri lingva egalrajteco kaj E-o, vidis taglumon la 7-an de majo en *Börtönűrség* ("Mal-libereja Gazeto"). (O. Princz)


USONO: 5000 poŝtkartoj

• En aprilo Miko Sloper, direktoro de la CO de ELNA, sendis al preskaŭ 5000 bazlernejaj instruistoj en Florido kaj Kalifornio poŝtkartajn informojn pri Esperanto. (*Kvaronjara Bulteno de AAE*)

• La 12-an de majo la konata ĵurnalo *The Boston Globe* sufiĉe favore artikolis pri E-o (<http://www.globe.com/dailyglobe/2132/living/Esperanto-shtml/>). (D. Gary Grady, Ret-Info)

INSTITUTO NARWAL

pligrandigos la teamon de Indiĝenaj Dialogoj (vd. majo, p. 89) per: *instruistoj* (ruse aŭ hispane parolantaj); *helpanto* (scipovanta la anglan), kiu, antaŭ kaj dum la kursoj, adaptos kaj pretigos la kursmaterialon; *tradukistoj* uzantaj la hispanan, rusan aŭ anglan. Ili spertu pri E-parolo kaj komputila laboro, havu ret-adreson: *Laboro pagota*. Informas Sylvain Lelarge; ☎+31/70/517-75-23; ✉narwal@usa.net.



Recenzoj

Originala prozo

Esence teorie kaj erotike

Ordeno de verkistoj. Romano (1985). Karolo Piĉ (1920-95). Saarbrücken: Ittis, 1997. 382p. 21cm. € 33,90.

La libro kategorie nomas sin romano, *ma* (sed) esence klasiĝas kiel *ak* (kaj) teoria libro *ak* (kaj) ties eksperimentaĵo. Ĝi resumas la ideojn de Piĉ, kiu preskaŭ finverkis ĝin en 1983, sed ĝi eldoniĝis post lia forpaso.

La romana situacio allogas: milionulo-esperantisto aĉetas eksmonaĥejon de la piarista ordeno en Litomiŝlo, Ĉeĥio, kaj faras ĝin "Ordeno de Verkistoj" — ejo kie e-istaj aŭtoroj vivas por produkti pliajn verkojn; tie pasas du jaroj. Laŭ mi, bona fikcio havu realecon en la detaloj, malgraŭ aŭ *graŭ* la situacio. Tial min frustris la romano; la Ordenaj gevivantoj interesiĝas,

Karolo Piĉ



krom pri esperantologio, nur pri subjupo kaj subkalsono. Ĉu la aŭtoro ne havis alion

ol erotikon por priskribi homajn vivojn? Rolas pluraj inoj kaj viroj, sed ili dividas sin por paroli la aŭtoran tezon poiome, apenaŭ kun individua personeco.

Kion diras do la aŭtoro tezo? Ĝi pledas por matura Esperanta kulturo, en kiu rolu Esperantaj verkistoj. Brave, tamen tio signifas al Piĉ enkondukon de multaj neologismoj, (kiel *ma* kaj *ak*) glositaj en 36 paĝoj. Mi akceptas manplenen da *eŭproponoj* (aŭ "bonaj" proponoj) miaguste — kaj guston oni rajtas kontesti. Sed mi ne trovas pravigon, ekzemple, por *friŝtiko*, *deĵeno*, *ceno* (matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo). La libron tralegos nur iuj, kiuj sen vortaro komprenas, ni diru, Auld-aĵon; pri tio eĉ fierus la aŭtoro.

Resume, la libro indas aŭ al teoriuloj pri Esperanta kulturo, aŭ al amantoj de Kaloĉajeska — t.e. Peneter-eska — erotiko.

SIBAYAMA Zyun'iti - Japanio

Persona perspektivo plezuriga

La ŝtona urbo. Anna Löwenstein (1951). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 350p. 21cm. € 22,70.

Kiom bele legi historian romanon el persona perspektivo! Triparta estas la libro: En la unua triono Bivana, juna keltino, rakontas pri sia vivo en vilaĝeto sudbrita iam antaŭ ĉirkaŭ du mil jaroj. En la dua ŝi jam troviĝas proksime al Romo kiel sklavo forrabita de sia hejmo, kaj ŝi devas adaptiĝi al tute nova vivo en la kuirejo de riĉula vilao. En la tria parto ŝi transloĝiĝas al la urbo Romo mem kiel edzino de skribisto, kune kun filo, kiu ege interesiĝas pri la t.n. nazaretanoj, kaj ilia vivo kunplektiĝas iom kun la sorto de la unuaj kristanoj. Fine Romo, la ŝtona urbo, forbrulas, kaj ŝia vivo ankoraŭfoje prenas novan direkton.

Jen plaĉa libro, legata kun plezuro, precipe la unua — la plej konvinka — parto. La du aliaj partoj impresas iom pli frag-



Anna Löwenstein

mentaj, kaj Bivana mem — kiu fariĝas Barbara en la nova mondo — estas ne tiom traridebla. Tamen, imponas la riĉeco de detaloj kaj la aŭtoro atento al etaĵoj (ekzemple: kion la homoj manĝis?) ofte pretervidataj en historiaj romanoj. Sed ĉe la

elstaras antaŭ la okuloj de la leganto, la homoj estas tre naturaj, kaj plej gravas ne la politiko, sed la personoj kaj ilia vivo. Same kiel en la reala vivo — kiom ajn ni pretendas zorgi pri la mondaj okazaĵoj, tamen ni atentis ĉiam kaj ĉefe pri ni mem kaj nia propra vivo.

La verko parte memorigas pri historia romano de Mika Waltari, traktanta la saman epokon, sed ĉi tie la aliro estas multe pli persona kaj malpli pretendas klarigi "kial" okazis tio aŭ jeno, strebo ofte plaganta historiajn romanojn. Barbara ne estas filozofo, sed simpla virino, popolano apenaŭ legokapabla, kiu komprenas nur parton el ĉio diskutata. Sed ŝia nekomprenejo, kvankam foje iom ĝena (mi ŝatus pli scii pri iuj detaloj. . .), donas konvinkoforton, apud la tute realismaj priskriboj pri la vivo de virino, pri la socioj, pri la homaj kaj kulturaj interrilatoj ktp, kaj apud la ege klara, facila kaj simpla lingvaĵo, kiu leĝere fluas tra la tuta libro.

Sabira Ståhlberg - Finnlando/Bulgario

Red.: La *ŝtona urbo* aperos ankaŭ anglalingve ĉi-jare, en iom mallongigita kaj adaptita formo, ĉe la brita eldonejo Citron Press (<http://www.citronpress.co.uk>), verkista kooperativo kiu specialiĝas pri verkoj de novaj aŭtoroj.



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj estas aparte bonvenaj. Koran dankon!

Laste aperis



Bibliografio de la verkaro de Ada Csiszár. [Red. A. Csiszár.] Budapest: Kal-Ĉi Dokumentaro, 1998. 30p. 21cm. € 1,50.

Diaj revelacioj. *Internacia eldono.* DEGUĈI Nao (1837-1918). El la japana trad. MAEDA Ŝigeki. Kameoka: Oomoto, 1999. 247p. ISBN 4 88756 030 3. 21cm. Bind. Baza sankta libro, kompilita el pli ol 200 mil folioj Di-inspirite verkitaj de la fondintino de Oomoto. Celita por servi kvazaŭ originalo por traduko en pliajn lingvojn. € 15,00.

Dialogoj de la dioj. Lukiano (ĉ. 120-180). El la helena trad. José F. Martín del Pozo. [Malaga:] Andaluzia E-Unuiĝo, 1998. 46p. ISBN 84 930304 1 4. 21cm. Satiro pri la helenaj filozofio, religio kaj mitaro, kaj pri la hipokrita, malsaĝa homaro. € 1,80.

Esperanto: Grammatica met oefeningen. Roel Haveman (1963), Arien-Sjoerd de Vries (1964). Bussum: Coutinho, 1999. 446p. ISBN 90 6283 144 3. 25cm. Nederlandlingva. Bind. Impona konsultlibro kaj (mem)lernilo. Kun kompaktdisko. €38,30. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Everyone's own language. *A guide to the international language known as Esperanto.* Maire Mullahey (1921). Dublin: Nitobe Press, 1999. 188p. ISBN 0 95352 840 5. 20cm. Anglalingva. Rakonto pri la e-istiĝo de la aŭtorino, kun baza kurso. € 6,00.

Grammar of Esperanto, The. *A corpus-based description.* Christopher Gledhill (1968). München / Newcastle: Lincom Europa, 1998. Languages of the World. 100p. ISBN 3 89586 217 7. 21cm. Anglalingva. Priskribo de E-o por lingvisto, bazita sur korpuso. € 36,90.

Instruado de Esperanto: Metodoj kaj materialoj. *Tekstoj de la seminario okazinta en Bolsena 29-4/1-5-1995.* R. Corsetti, E. Vilisics, A. Di Donato, C. Bourlot, L. Pampaloni kaj P. Cinquantini. Red. M. Lipari kaj P. Da Costa. Milano: CoEdEs, [1996]. 19p. 30cm. Ringe bind. € 6,00.



Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto (1976). Karolo Piĉ (1920-95). Saarbrücken: Iltis, 1999. 536p. ISBN 3 932807 10 3. 21cm. Postparolo de Reinhard Haupenthal. La plej ampleksa literatur-sciencia verko ĝis nun aperinta en Esperanto. Faksimilo de la origina tajpaĵo. € 45,00.

Krono de l' sonetoj / Sonetni venec (1834). France Prešeren (1800-49). El la slovena trad. Tone Logar (1913-94). Ljubljana: Esperanta Turisma Societo, 1996. 71p. ISBN 961 6100 21 1. 21cm. Dulingva. Ilus. Ĉefverko de la plej fama slovena poeto. € 4,50.

Kuniks la kuniklo. Teksto kaj akvareloj de Kavlán [Jean-Pierre Cavelan, 1943]. Nice: la aŭtoro, 1999. 12p. 30cm. Plenkolora preso. Bildstrio: Kiel amiĝas kuniklo kun la hundoj de la aŭtoro. € 11,40.

Lando malekzista. Edith Södergran (1892-1923). El la sveda trad. Sabira Ståhlberg. Varna: Bambu, 1999. 92p. ISBN 954 9637 05 0. 20cm. Antaŭparolo de Sten Johansson. Antologio el la verkoj de poetino konsiderata kiel la plej granda modernisma aŭtoro finnlanda. € 9,30.

Spiritaj instruoj, tekno-muziko kaj artisma bildrakonto interalias en la ĉi-monata oferto.



Libere de la konoj (1969). J. Krishnamurti (1895-1986). Elangligis Yves Bachimont. Varna: Bambu, 1999. 95p. ISBN 954 9637 04 2. 20cm. Spiritaj instruoj celantaj "igi la homojn absolute, senkondiĉe liberaj". € 7,80.

Lingue pianificate ed Esperanto. *Una ricerca sui problemi linguistici del loro funzionamento.* Silvia Lacquaniti. Milano: CoEdEs, [1994]. 189p. 21x30cm. Itallingva. Ringe bind. Doktora tezo pri planlingvoj kaj Esperanto. € 6,00.

Luĉifero (1883). Mihai Eminescu (1850-89). El la rumana trad. Jozefo Petrin. San Francisco: California Publishing Co., 1998. 47p. ISBN 0 940471 59 0. 21cm. Ilus. Filozofia poemo de la plej elstara rumana poeto, prezentanta "la konflikton inter la artkreato kaj la ĉirkaŭanta mondo". € 4,80.

Maigret hezitas. *Krimromano* (1968). Georges Simenon (1903-89). El la franca trad. Daniel Luez. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 128p. 20cm. Mondfama Pariza komisaroenketas unuafoje en Esperanto. € 6,80.

Omaĝe al Kálmán Kalocsay. *El Abaŭj-szántó ĝis la Esperanta Parnaso.* Ada Csiszár (1930). Budapest: Kal-Ĉi Dokumentaro, 1998. 143p. 30cm. Ringe bind. Unua volumo de ampleksa biografia kompilaĵo. Kun fotoj, desegnoj, reproduktaj ks. (Vd. majo '98, p. 86.) € 21,00.

Plutoso (388 a.Kr.). Aristofano (ĉ. 448-380 a.Kr.). El la helena trad. (1906) Eugène Noël. Ed. José F. Martín del Pozo. [Malaga:] Andaluzia E-Unuiĝo, 1998. 62p. ISBN 84 930304 0 6. 21cm. Alegorio pri la malegala distribuo de riĉeco, fare de klasikulo de la helena teatro. € 2,40.

Proverbaro — Nia komuna heredaĵo. Erkki Röntynen (1936). Oulu: la kompilinto, 1999. 203p. 24cm. Proverboj el la tuta mondo, grupigitaj laŭ tema simileco. € 15,00.

Tunelo, La. Marco Picasso. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 1998. 171p. ISBN 3 906595 02 9. 21cm. Romano pri hezitema amo kaj profesia konflikto de mezaĝa inĝeniero. € 13,20.

Verda sanktejo, La (1981). Hervé Bazin (1911-96). El la franca trad. Christian Rivière. Nantes: la tradukinto, 1998. 260p. 21cm. Ekologiema romano pri homo "kiu venas de nenio", plastike bildiganta la francan kamparon de la 70-aj jaroj. € 16,80.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Bretona Esperanto-Koruso kantas en Quintin. 12 aprilo 1998. Korus-estro: Françoise Provost. El la bretona, franca k.a. trad. J. Le Pail, J. Danvy k.a. Saint Brieuc: Esperanto-22, [1998]. Ĉ. 40 min. 14 kantoj, duone lokaj, duone diversnaciaj. € 12,00.

PoLimoRFiA ArkiteKniA. Solotronik (ps. de Eduardo Vargas/Solo, 1959). Donneville: Vinilkosmo, 1998. 29 min. Tekno-muziko poezi-plena, uzanta tekstojn de la "iberia skolo" kaj la voĉojn de Renato Corsetti kaj Barbara Pietrzak. € 15,00.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Emilio ARIAS GARCÍA (1916-1999), tre aktiva meksika e-isto, varbita de T. Sekelj en 1954, siatempe delegito pri gastigo kaj turismo, mortis la 9-an de aprilo en Meksikurbo. La aliĝo de Meksika E-Federacio al UEA (1978) estis precipe lia merito.

Maria BECKER-MEISBERGER (1925-1999), dumviva membro, forpasis la 1-an de majo en Blieskastel (Germanio). Lerninte E-on en 1956, ŝi aktivis loke, i.a. kiel vicprezidanto de Sarlanda E-Ligo. Pli ol dek jarojn ŝi verkis kuirrubrikon de *Monato*, el kio rezultis la libro *Internacie kuiri* (1990, diplomita de OSIEK en 1998). Ŝi germanigis (1993), kun la edzo Günther Becker, la monografion *L'espéranto* de Janton.

H. BOUMAN (1920-1999), dumviva membrino, forpasis lastatempe en Roterdamo.

Richard FIIRGAARD (1919-1999), esperantisto de la 30-aj jaroj, gvidinto (1953-78) de la E-klubo en Århus (Danio), de tutlanda libroservo (1950-57) kaj de prelegvojaĝa servo, mortis la 1-an de marto.

Mary Lou HULTBERG (1921-1999), delegitino en Potsdam (Novjorkio, Usono), forpasis la 21-an de marto.

ĜUSTIGO

Robert Alberg (apr., p. 80) ne tradukis librojn. La romanon *Sep fratoj* de Aleksis Kivi hebreigis el E-o Itamar Even-Zohar, en 1957. Dankon al Josef Šemer pro la informo.



Komplezo de Werner Plönnig

Maria JENZEN (1919-1998), klubaktivilino kaj gvidinto de kursoj en Stralsund (Germanio) ekde 1973, forpasis la 25-an de majo.

Ivan KIRČEV (1923-1999) mortis la 29-an de aprilo en Razgrad (Bulgario). Fondinto kaj prezidanto de la E-ista Domo de Kulturo en Razgrad, li estis honora membro kaj eks-estrarano de Bulgara E-Asocio, iama delegito de UEA kaj honora urbano de Razgrad — interalie pro siaj meritoj pri Esperanto.

Zofia KŁOPOCKA (1915-1999), instruistino, E-organizanto, iama delegito pri pedagogio kaj vicdelegito en Lodzo (Pollando), mortis la 26-an de marto en Ostrowite.

Cameron Q. SACKEY (1961-1999) forpasis la 23-an de aprilo en Akrao. Li estis la fondinto kaj ĝis sia morto la ĝenerala sekretario de Ganaa E-Movado, dum 6 jaroj la sola delegito en Ganao. Nome de UEA, Raoul Hounnake ĉeestis lian funebran ceremonion la 5-an de junio.

SEKIJU Masazumi (1913-1998), iama delegito pri turismo, mortis en Sangō (Japanio).

Irlene SHOEMAKER (1899-1999), iama delegitino, mortis la 27-an de januaro, preskaŭ centjara, en Fayetteville (Arizono, Usono).

Anna Maria SLOT-VAN DER MEULEN (1905-1999), dumviva membro, forpasis la 4-an de marto en Zeist (Nederlando).

John Alan SPENCER (1908-1999), konata aktivulo de SAT kaj de ties brita branĉo, forpasis la 2-an de marto en Londono.



Komplezo de Peter Oliver

Jaroslav ŠPERLING, prezidanto de la ĉeĥa sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia, forpasis 77-jara, la 14-an de februaro.



Kongresa Libro de la Portlanda UK

Anne WHITTEKER (1919-1999), dumviva membro de UEA kaj de ELNA, ano de Societo Zamenhof, mortis la 10-an de marto. Ŝi estis

longtempa delegito en Portland (Oregonio, Usono), kie ŝi partoprenis en la organizado de la 57-a UK (1972).

Gerda WULFERS-MEDDENS (1911-1999) forpasis la 22-an de aprilo en Nimego (Nederlando), kies E-societon ŝi kun sia edzo kunfondis en 1961. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj ŝi redaktis la kluban *Nia Bulteno*. Longe delegito pri turismo, ŝi estis regula ano de Societo Zamenhof kaj mecenato.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ✉ kenderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Por esti ĝisdata pri la evoluo kaj faka literaturo de interlingvistiko kaj esperantologio

INFORMILO

POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) €6,80; EU-landoj €7,20. Abonu ĉe UEA.

POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA.
Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Dua eld. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998. 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21 cm. Prezo: €3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA mezuras la kapablon uzi Esperanton en praktiko. Centoj da esperantistoj jam ekzamenigis kun sukceso je elementa aŭ meza nivelo. Tiu ĉi gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari sin por ekzameno. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj. Specimenaj testoj de la du niveloj konigas la praktikan funkciadon de la ekzamenoj. La libreto taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj.

Barbara Despiney gvidos konversaciajn rondojn en la kampadejo "Pré-fixe" (Haute Garonne, Francio) en julio 1999. Kontakto: 31420 CASSAGNABÈRE, tel./fakso 33561987100.



TUTMONDECA RIGARDO



Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologiajn evoluojn? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologiajn ŝanĝojn? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

"Helpas akiri pli tutmondecan rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo."
(Ulrich Lins)

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: €6,80.

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko




helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KIATATO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KIATATO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1999 **KIATATO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

Pionira vortaro por mondlingvo



KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.
Georgeo Abraham. Rotterdam: UEA, 1998. 308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm. Prezo: €13,70.

"Grava helpilo por komencantoj kaj progresintoj"
(Hugh Martin)

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi tiun mankon.

Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la radikoj.

STRATEGIA FORUMO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO



Berlino,
5 aŭgusto 1999

Estrarano Petro Chrdle sendis al ĉiuj E-organizaĵoj partoprenintaj en la unua, Montpeliera kunsido de la Forumo kaj al ĉiuj konataj establoj kiuj praktike uzas Esperanton, inviton al la dua kunsido, dum la Berlina UK. La diskuto, fokusigonta al la strategio de la E-komunumo, celos veni al komuna deklaro akceptota de plimulto de la ĉeestantoj. Ĉiu organizaĵo rajtas sendi unu reprezentanton. Establoj kiuj ial ne ricevis la inviton, kontaktu Chrdle (adreso en la kolofono). Por prepariĝi al la diskuto, utilis legi la materialojn de la Montpeliera kunsido, kiuj ĵus aperis kiel Esperanto-dokumento (*Ĉiuj kune*, €2,15).


Patrino
koro

Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./preso). 148p. 17 cm. Prezo: €4,10.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO.

Heidi Suonuuti. El la angla trad.

Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke.

Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92 9017 057 3.

21 cm. Prezo: € 5,45.

Triona rabato ekde 3 ekz.



Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino estas multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj funkciulo de ISO, Internacia Organizaĵo por Normigado. La originalo estis verkita laŭ komisiono de Nordterm, asocio de terminologiaj societoj en Nordio.



MULTKOLORA GLUMARKO IGAS VIAJN KOVERTOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!

Prezo de folio (12 glumarkoj): € 1,35.

Triona rabato ekde 3 folioj.



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ € 0,80 (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Tranĉu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA! Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin ĝis la 31-a de dec. 1999 mendi kion ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!



Kongreskotizo: 160 USD por A-landoj; 100 USD por B-landoj. Senpage por infanoj ĝis 13 j. kaj akompanantoj de handikapuloj.

Loĝado: 5★ Hotelo Horison (la kongresejo): 65USD; 4★ kaj 3★ Hotelo Hanoi 27-47 USD; Hotelo Kim Lien 7 USD (dulita ĉambro). **Tage tri manĝoj:** 20 USD (Horison), 15 USD (Hanoi), 10 USD (Kimlien). **Ekskursoj** duontagaj ĉiutage, en kaj ekster la urbo. **Antaŭ- kaj postkongresoj,** vesperaj kulturaj kaj amuzaj programoj antaŭvidataj. **Limdato por mendoj:** 20 junio.

Fakaj asocioj kiuj planas organizi kunsidon dum la kongreso, kontaktigu kun Puramo CHONG (☐puramo@chollian.net).

Loka organizanto: Vjetnama E-Asocio, 105A Quan Thánh Str., Hà Nội; ☎+84/4/823-20-12; ☎/733-02-01. Informas ankaŭ Komisiono pri Azia E-Movado (☐kaem@egroups.com) kaj Japana E-Instituto (☐jei@mre.biglobe.ne.jp). **Aliĝilo** petebla de la CO de UEA.